

1978 februaro

71-a jaro


n-ro 866 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



La dua movada kontinento



Vi trovos

nur nun — en februaro — la novjaran mesaĝon de la prezidanto de UEA. Kiel ajn bele kaj simbole estas verki tiujn mesaĝojn ĝuste je la Zamenhof-Tago, ni devos peti la prezidanton, ke li estonte verku ilin plej malfrue je la Tago de Homaj Rajtoj, ĉar ili nur tiamaniere trafos niajn januarajn numerojn. La fakto, ke vi eĉ kun unumonata prokrasto tamen trovas tiun mesaĝon en ĉi tiu numero signifas, ke ĝi, kompreneble, perdis nenion de sia aktualeco. Pensu do, ke ĝis la sekvanta jara mesaĝo restas nur dek unu monatoj kaj, ke, sekve, necesas agi kun iom akcelita ritmo.

Tem-vario ne mankas en ĉi tiu numero. Post la aziaj paĝoj (Irano) en la du antaŭaj numeroj, ni nun katapultigis en Sud-Amerikon, ne nur pro prefero de tiea somero nuntempe al la vintra februaro en Eŭropo. Sur la paĝo 29 vi legos iom fortan enkondukon. Tamen, kiom longe oni ankoraŭ toleru, ke diversaj moŝtoj de la publika vivo paradu per la nekono de la demandoj, kiujn ili pretendas "aŭtoritate" debati?

Dankon al multaj el vi, kiuj, okaze de la jarŝanĝaj festotagoj, sendis al UEA (t.e. al la Estraro, Centra Oficejo, redakcio) siajn bondezirojn. Ni plej kore reciprokas tiujn bondezirojn!

Enhavo

- 21 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Ĝeneraligi la jamajn sukcesojn (Humphrey Tonkin)
- 22 Kultura imperiismo: Kontraŭ koloniigo de cerboj (Giulio Cappa)
- 23 Januara estrarkunsido: Diskuto pri ĝustaj temoj
- 24 Tutmondigo de la Esperanto-movado: Tra la kontinento de la 66a UK
- 26 Esperanto kaj scienco: Ni ne konsistu nur el poetoj (C. Støp-Bowitz)
- 28 Eŭropa agado: En la Okcidento io nova (D-ro Pol Denoël)
- 29 Eŭropa Konsilio pri la lingvoproblemo: Angloj lernu la francan por kun norvegoj ferii en Hispanio (Thierry Lelogeais)
- 30 Agadplano pri edukado: Plenkreskuloj en la fokuso
- 31 TEJO-paĝo: TEJO-Estrararo en Rotenburg: Kunsidi ĝustaloke (T. Bormann kaj S. MacGill), Okazis seminario, pretiĝas labortendaro
- 32 Kolektado de poŝtmarkoj: Dudek mil guldenoj el paperkorbo
- 33 Recenzoj ("Venis viro", "Kristnaska triptiko", "Tonio Kröger")
- 34 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 35 Kongresa komunikado (novaĵoj pri la 63a Universala Kongreso en Varno)
- 36 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 38 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 39 Oficiala informilo el la CO de UEA, Ekzameno E (Bernard Golden)
- 40 Nekrologoj (J. Antunes, I.J. Bril, M. Gádaros, P. Korte, H. Lüthi, J. Poplawski, A. Ramírez Teruel, A. Simon, L. Wendell), Anoncetoj

La kovrilo

Kontinento sur la kovrilo celas atentigi pri enradikiĝinta kutimo epiteli la Esperanto-movadon "eŭropa", kvankam ĝi estas samgrade "sudamerika" aŭ ĝi povus esti tia, se ni nur ŝanĝus niajn eksmodiĝintajn mezurilojn. La "dua kontinento de la Movado" estos la "unua" post kelkaj jaroj, kiam la 66a Universala Kongreso de Esperanto en 1981 faros historian salton al la futurologie konstruita ĉefurbo de la plej vasta lando de Sud-Ameriko. La kovrilaj bildoj montras jenon: Ekmoviĝon de giganta galapaga testudo ĉe la nula latitudo en Ekvadoro (supre, maldekstre), akcepton de esperantista delegacio ĉe s-ro Elmo Serejo Farias (maldekstre), guberniestro de la Federacia Distrikto de Brazilo (supre, dekstre), faman kolombian ensemblon "Kvara generacio", kiun gvidas esperantisto (centre), kunvenon de aktivuloj de Brazila Esperantista Junulara Organizo (sube). Pensu pri la kovrilo kiam vi legos la tekston sur la paĝoj 24 kaj 25 de ĉi tiu numero.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mińsk, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Ĝeneraligi la jamajn atingojn

LA PLEJ BONA karakterizado de la celoj de la Esperanto-movado venis en 1977 ne de parolanto de la Internacia Lingvo sed de eksterulo: "Estas samtempe ... respekto al la kulturaj diversecoj kaj ... deziro je internacia alproksimiĝo, kiuj motivas nin." Per tiuj vortoj la koncerna parolanto ĝuste komprenigis, ke la Internacia Lingvo kapablas samtempe ŝirmi la kulturojn kontraŭ la atencoj de la grandaj lingvoj kaj ebligi rektan komunikadon inter diverslingvanoj. Ĝi do samtempe apartigus (por konservi la kulturajn valorojn) kaj kunigus (por akceli la senperajn kontaktojn).

La parolanto estis s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de Unesko. La okazo de lia parolado estis la Universala Kongreso de Esperanto. Neniam antaŭe tiel eminenta funkciulo de internacia organizaĵo gastis en unu el niaj internaciaj kongresoj.

Tiujn vortojn aŭdis kaj eĥis alia ĉeestanto en la inaŭguro de nia kongreso, la islanda ŝtatprezidanto, s-ro Kristján Eldjárn. Nur malofte en la pasinteco partoprenis nian kongreson ŝtatprezidanto. Preskaŭ samtempe en alia mondparto, alia ŝtatprezidanto esprimis sin pri Esperanto. En mesaĝo al la usona nacia Esperanto-kongreso, Prezidento Jimmy Carter skribis: "Pli-bonigita komunikado inter individuoj kaj nacioj estas unu el la ĉefaj metodoj por konstrui pli grandan internacian interkomprenon kaj bonvolon. Mi laŭdas viajn klopodojn kontribui al tiu celo." La usona ŝtatprezidanto ne estis la sola nova favoranto de nia laboro: la revuo *Soveta Unio* aperigis, kelkajn monatojn antaŭe, longan favoran intervjuon pri Esperanto. Radio Vatikano komencis utiligi Esperanton. En Irano, senprecedence multaj civitanoj ekfrekventis Esperanto-kursojn. La nunaj estas eksterordinaraj tagoj por Esperanto. Entute, la jaro de la naŭdeka datreveno de Esperanto estis eksterordinara jaro.

Sed ni ne perdu nian ekvilibron. Okazis iom similaj sukcesoj en pasinteco. Pensu nur pri la periodo 1923-

24. Senprecedence granda Universala Kongreso, favora rezolucio de la Franca Akademio de Sciencoj, granda komerca konferenco pri Esperanto, debatoj en la Ligo de Nacioj... Ĉio ĉi konvinkis multajn homojn, ke la venko jam alproksimiĝas, ke nur necesas atendi ĝin. Pensu nur pri 1954, kiam Unesko, sub lerta premo de profesoro Lapenna kaj liaj helpantoj, rezoluciis rekone al la kontribuo de Esperanto al la proksimigo de la popoloj de la mondo.

Ni povas demandi nin kial je tiuj pli fruaj okazoj la sopirata rapida disvastiĝo de Esperanto ne okazis. Eble la politikaj kondiĉoj ne estis maturaj, eble niaj organizaĵoj ne estis sufiĉe fortaj por ekspluati la ŝanĝigantajn kondiĉojn, eble mankis unueco inter la laborantoj, aŭ mankis la volo fine kaj definitive antaŭenigi la aferon.

Nun denove ni staras ĉe tiu jam vizitita sojlo. Antaŭe ni ne sukcesis transpaŝi ĝin, retroirante denove, perdinte fidon, konfuziĝinte pri la vojo, laciĝinte.

Ĉi-foje ni ne permesu retroiron. Jen ŝtatestroj subtenas nin: ni uzu tiun subtenon por turni aliajn niadirekten. Jen ekzistas bona volo en internaciaj organizaĵoj: ni utiligu ĝin. Jen ordinaraj popolanoj lernas la Internacian Lingvon: ni semu similajn semojn en aliaj eble fekundaj landoj. Necesas **ĝeneraligi** niajn jamajn atingojn, **internaciigi** la sukcesojn en unuopaj landoj, kaj **konstrui novajn sukcesojn sur la jam atingitaj**.


Kaj kiel ni sukcesu, se la optimistoj de 1924 malvenkis? Ĉar ni posedas multajn avantaĝojn, kiujn ne posedis niaj antaŭuloj. Unue, ni laboras por matura lingvo — pruveble pli fleksebla kaj pli profunda ol tiu de 1924. Due, ni laboras per fleksebla kaj unueca Asocio. Trie, tiu Asocio estas finance kaj administre solida, dank' al la ŝparoj kaj plifortiĝoj de la pasintaj tri jaroj. Kvare, kaj ĉefe, ni laboras en mondo, kiu, kvankam ankoraŭ longe for de tiaj atingoj, tamen komencas kompreni la valoron (aŭ, pli precize, la neceson) de harmonia kunvivado en spirito de reciproka komprenemo. Unu el la necesaj kondiĉoj de tiu komprenemo estas, aŭ devas esti, taŭgaj lingvaj rimedoj. Naciaj lingvoj eble povas helpi, sed nur Esperanto povas liveri tiun duoblan garantion, kiun aludis s-ro M'Bow, nome la garantion de kultura diverseco kaj internacia kompreniĝo.

Ni posedas la rimedojn. La kondiĉoj estas maturaj. Do, la vojo estas malferma kaj la sojlo trapasebla. Ĉu ni kuraĝe antaŭeniros aŭ time hezitemos? Ĉi-foje ni ne hezitu. Ni prenu per ambaŭ manoj la defion de 1978. La vojon al la ĝenerala utiligo de Esperanto ni firme kaj definitive malfermu.

Sukceson al ĉiu nia membro, al ĉiu laboranto por la Internacia Lingvo, en la jaro 1978!

Zamenhof-Tago, 1977

Humphrey Tonkin



En Irano la 1-an de januaro komenciĝis plia amasa E-kurso.

Kontraŭ koloniigo de cerboj

EN JULIO 1976, la Ligo por la Rajtoj de la Popoloj, dum konferenco en Alĝero, ellaboris kaj subskribis "Deklaracion pri la rajtoj de la popoloj". Ne temas pri abstrakta listo de utopiaj principoj, sed pri la klopodo elmontri, ke apud tradicia internacia juro — la juro de la ŝtatoj — naskiĝis nova internacia juro, la juro de la popoloj. Precedencoj amasiĝis dum la jaroj: la principaro de la usona prezidento Wilson kaj la preskaŭ samtempa deklaro pri la rajtoj de la popoloj fare de la soveta revolucio; la konstanta insistado de UN pri la rajto je mem-determino, kies plej solena substrekado estis la Deklaracio pri la donado de sendependeco al koloniaj landoj kaj popoloj* el 1960. La "Deklaracio pri la rajtoj de la popoloj" ne estas frukto de interŝtata kunlaboro, kvankam la verkadon partoprenis mondfamaj juristoj. La homoj kaj organizoj kiuj ĝin subskribis ne reprezentas registarojn nek ligas ŝtatojn al ia observado. Malgraŭ tio, la ĉarto eniris la mondajn universitatojn, iĝis temo de nemezurebla kvanto da debatoj kaj seminarioj. La respondo de la esperantistoj estis inter la plej fruaj: jam en aŭgusto 1976, dum la 33a TEJO-kongreso en Poitiers, laborgrupo diskutis pri la alĝera dokumento, freŝe esperantigita.

El tridek artikoloj kiuj konsistigas la "Deklaracion pri la rajtoj de la popoloj", la Ligo elektis la duan kiel temon por seminario, kiu okazis, denove en Alĝero, lastan oktobron, de la 10a ĝis la 15a: "ĉiu popolo rajtas respekton al ĝia nacia kaj kultura identeco". La forto, kiu tiun principon kontraŭas, estis identigita kiel "kultura imperiismo". Tiu esprimo ne estas tute fremda en la esperantistaj rondoj, dank' al plurjara prezentado de la koncerna problemaro fare de aktiva internacia grupo kiu ariĝis sub la ŝildo de Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO. D-ro Fabrizio Pennacchietti, universitata profesoro pri orientaj lingvoj en Venecio, estis komisiita reprezenti KER de TEJO ĉe la dua alĝera konferenco. Lia interveno konsistis el prelego, kiu bonege resumas la rezultojn de la daŭra KER-studado pri la temaro de lingva diskriminacio.

Prof. Pennacchietti rimarkis, ke nuntempe la ŝtatoj estas distingeblaj laŭ skalo de potenco, bazita sur valoroj inter kiuj pleje gravas ekonomika forto. La ŝtatoj kiuj situas pli alte en tiu skalo regas kaj influas ŝtatojn "malsuperajn". La plej rekta rimedo per kiu tia hegemonio konsistiĝas estas ĝuste ekonomika superregado, strikte subtenata de arma kaj politika potenco. Tiuj

* Tiu dokumento aperis pasintjare en nia januara numero, de kie UN reprenis ĝin kiel apartan eldonadon, haveblan ĉe la Libro-servo de UEA (kontraŭ 1 internacia respondkuponon) aŭ ĉe la informcentroj de UN (v. la liston en la Jarlibro 1977, p. 342).

aspektoj estas okulfrapaj, dum malmulte esplorita kaj ne tute evidenta estas la kultura aspekto de imperiismo. La senĉesa bombado, kiun "malsuperaj" ŝtatoj ricevas per lingvokursoj, televidprogramoj, libroj kaj gazetoj en "superaj" lingvoj, ne estas cetere nur demando de prestiĝo. La unua avantaĝo por la pli forta estas la larĝigo de specifa kulturindustria merkato. La dua avantaĝo konsistas el tio ke la hegemonia lando kreas pri si bildon de lando progresinta kaj alloga, kiu instigas la admiron de la eksteruloj kiuj tiun bildon ricevas. Tio ne povas ne influi la sintenon de la civitanoj de la ricevanta lando, kiuj paŝon post paŝo ekakceptas la valorojn regantajn en la "superaj" landoj, klopodante — konscie aŭ nekonscie — ilin imiti. Tia enpenetrado de kulturaj valoroj ege malfaciligas sobran juĝon rilate al la pli rektaj ekonomiaj kaj politikaj influoj de la pli forta lando. Atentigante, ke la unua paŝo de ĉia kultura imperiismo estas la enkonduko de la lingvo de la hegemonia ŝtato, prof. Pennacchietti substrekis la rolon de la esperantistoj, kiuj solaj sisteme kontraŭstaras ĉiujn lingvajn diskriminaciojn kaj kulturajn imperiismojn, kvankam eble ili ne ĉiam bone vidas la ligojn inter tiu problemoj kaj la aliaj aspektoj de kondiĉado fare de potencaj al malfortaj landoj. Lingva imperiismo, kaj konsekvence la pli ampleksa kultura imperiismo, povas esti venkita nur per la uzado de lingvo neŭtrala, kiu, ne apartenante al ia aparta popolo, ne taŭgas en la rolo de subprema ilo.

Dum la laboroj de la oktobra konferenco, kiun partoprenis eminentuloj kaj reprezentantoj el ĉiuj kontinentoj, evidentiĝis tri ĉefaj aspektoj laŭ kiuj estas nuntempe praktikata la "koloniigo de la cerboj". La alte perfektigita rolo de **amaskomunikiloj** faciligas la kulturan enpenetradon de certaj mesaĝoj ĉien en la mondo. La disvastigo de komplikaj teknologioj en la tereno de **scienco** certigas daŭran **edukon** dependecon de la triamondaj landoj al la landoj kiuj ellaboras kaj eksportas la plej ĝisdatajn sciojn. Sed centra kaj fundamenta aspekto de kultura superregado estas la amasa instruado de la plej "fortaj" lingvoj, kiu prezentiĝas en la plimulto de la kazoj kvazaŭ vera atenco al la identeco mem de la malpli fortaj popoloj. Itala senatano Lelio Basso, prezidento de la Ligo por la Rajtoj de la Popoloj, en sia prelego memorigis, ke kulturo estas ĉefe lingvo, t.e. la bazo de ĉia interhoma komunikado. Kiam fremda lingvo iĝas ĉefa perilo de la rilatoj kun aliaj homoj, ĝi iĝas supera kaj neatakebla fonto de ekstera dominado. Nenio estas pli rekta, pli personeca ol la lingvo. Ĝi estas neanstataŭigebla esprimrimedo. Kiam oni ekuzas fremdan lingvon, oni ne nur malriĉigas sian vortprovizon, sed ankaŭ pli kaj pli eniras la pensmanieron kiun tiu lingvo kunportas. Tio signifas kompletan perdon de kontakto kun la kultura fono de la propra komunumo.

Oni klare vidas, ke nuntempe la debato pri kulturo kaj homaj interrilatoj pli kaj pli proksimiĝas al nia tereno. Oni ne rajtas preteratenti tiun evoluon ĝuste nun, kiam en la diversaj partoj de la mondo iĝas ĉiam pli aktuala la temaro kiun la Movado debatadas jam de naŭ jardekoj.

Giulio Cappa



La Estraro okupiĝis pri la programo de estonta agado. La novaj estraranoj Maertens (maldekstre) kaj Pettyn (dekstre).

JANUARA ESTRARKUNSIDO:

Diskuto pri ĝustaj temoj

SE LA KOMITATO estas la asocia "parlamento", tiam la Estraro estas la "registro" de UEA. Kiel kutime post la elektojaro, ankaŭ ĉi-foje, kun tiu "interkona" kunsido en Rejkjaviko, oni povis prave atendi, ke nur la januara kunveno markos la efektivan laborkomenciĝon de la nova Estraro de UEA. Tamen, en la CO en Roterdamo, inter la 6a kaj 8a de januaro 1978, la Estraro diskutis ĝustajn temojn kaj montriĝis jam plene enlaboriĝinta. Tio devus esti bona aŭguro por la agadperiodo, kiu finiĝos per la novaj elektoj en 1980.

En la kunsido mankis nur mag. William Auld, pro malbonfarto; ĉeestis pluraj oficistoj de la CO kaj d-ro U. Lins, dum la traktado de CED- kaj eldon-aferoj. Kvankam la tagordo estis iom malpli ampleksa ol kutime, ĝi entenis plurdekon da eroj, kiujn la Estraro sukcesis tralabori eĉ pli rapide ol antaŭvidite.

Pluraj el la estraraj decidoj aperas dise tra ĉi tiu revu-numero (v. la paĝojn 24, 28, 30, 35). Oni ne multe dis-

kutis pri la financoj, ĉar tion regule faras la koncerna komisiono, kiu studas la demandojn kaj antaŭpreparas la decidojn sur tiu kampo. La Asocio verŝajne notos malgrandan deficiton, kiam saldiĝos la kontoj por 1977. Tamen, la bilanco montros, ke la financa situacio estas sana kaj ke pluraj fondaĵoj estas tre bonstataj. Verŝajne montriĝos, ke la 62a UK en Rejkjaviko ankaŭ finance estis eksterordinare sukcesa entrepreno.

La Estraro oficialigis la konsiston de pluraj asociaj komisionoj, sed tiujn nomojn vi legos en la Jarlibro 1978. Oni decidis lupreni oficejan spacon por la Grafika Centro de UEA en Antverpeno kaj subvencii Eŭropan E-Centron (v. la paĝon 28) en Bruselo. UEA aŭspicias la ĉi-jaran sesion de SUK, franglingvan tradukan konkurson, teatran renkontiĝon en Pollando kaj la Unuan Latinamerikan Kongreson de Esperanto en Marilia (Brazilo). Niajn legantojn certe interesos ankaŭ ĉi tiuj decidoj: UEA mendis (kaj eldonos) ĉ. 300-paĝan originalan legolibron por komencintoj de d-rino Marjorie Boulton; estas faritaj principaj decidoj kongresi en Stokholmo en 1980 kaj en Brazilio en 1981.

La Estraro dediĉis duonan tagon al diskutoj pri agadprogramo, ne por unu jaro, sed por pli longa — 10-jara — periodo. Por ĉiu agadsfero oni ellaboros specifajn programojn, similajn al tiu pri la edukado, sur la p. 30.



Vigla kaj kolegeca etoso dum la estrarkunsido: De maldekstre: H. Tonkin, W. Bormann, F. Szabó-Felső kaj G. Maertens.

Tra la kontinento de la 66a UK

Inter la 14a kaj 31a de decembro 1977, s-ino Ursula Grattapaglia, estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado, faris grandegan vojaĝon kaj vizitis ĉiujn sudamerikajn landojn en kiuj ekzistas organizitaj klopodoj disvastigi la Internacian Lingvon. Laŭ pluraj indicoj, tiu vojaĝo povus signi tute novan etapon ne nur por UEA, sed por la tuta internacia Esperanto-movado.

DELONGE oni aŭdas lamentojn pri la "eŭropeco" de la Esperanto-movado, pri la neceso tutmondigi ĝin, universaligi ankaŭ Universalan Esperanto-Asocion kaj aliajn internaciajn movadajn organizaĵojn. Sporadaj plendoj unuflanke, kaj persisto pri eŭropa centrismo (kotiznivelo, kongreslokoj, ŝpara insisto pri eŭropaj estraranoj ktp.) aliflanke, povis konduki la Movadon nur al ripetoj de la samaj bedaŭroj. Kun escepto de izolitaj klopodoj ekstereŭropigi la Movadon, kiujn siatempe faris Tibor Sekelj kaj s-ino Haudebine, nenio estis plane farita dum jardekoj sur tiu kampo. Lastatempe, tamen, la laboro de Renato Corsetti kaj klopodoj de aparta komisiono de TEJO pri regiona agado

S-ino Grattapaglia verŝajne faris la plej multekostan vojaĝon en la pli nova historio de UEA. Tamen, la informoj, renkontiĝoj, impresoj, instigoj, diskutoj, intervjuoj kaj artikoloj, kiujn ŝi kolektis, ĉeestis, spertis, faris aŭ provokis, multoble superas la valoron de la farita investo. Jen kelkaj notoj, laŭlande, pri tiu eksterordinare grava vojaĝo:

Brazilo: Ankaŭ movade ĝi estas la plej granda sudamerika lando. Malunueco estas la ĉefa trajto de la brazilaj Esperanto-organizaĵoj. Lukso estas havi plurajn tutlandajn organizaĵojn, kiuj kontraŭbatalas unu la alian. Tamen, la 17an de decembro 1977, tie okazis unuaj



S-ino Ursula Grattapaglia raportas pri sia vojaĝo al la Estraro: La homoj en Sud-Ameriko ne estas bone informitaj pri UEA kaj sentas sin izolitaj de la internacia Esperanto-movado.

signas komenciĝon de sistema atento al la demando de la movada tutmondigo. La kuraĝa paŝo, kiun en Rejkjaviko faris la Komitato de UEA, elekti s-inon Ursula Grattapaglia el Brazilo en la Estraron de la Asocio kaj doni al ŝi tie ĝuste la taskon pri landa kaj regiona agado, estas certe unuaranga kontribuo al la universaligo de la Esperanto-movado. La ĉeesto de ekstereŭropano almenaŭ certigas, ke la Estraro en siaj kunsidoj ne parolos nur pri Roterdamo, Antverpeno, Bruselo, Paderborn, La Chaux-de-Fonds, Budapeŝto kaj Varsovio, sed ankaŭ pri San-Paŭlo, Montevideo, Bogoto, Bonaero kaj Santiago.

Fakte, la kazo de Sud-Ameriko estas indiko, ke la Movado estas malpli eŭropeca ol ni emas konsideri ĝin tia. Nur pro niaj eŭropaj mezuriloj (nombro de membroj kaj kongresanoj), la Movado ŝajnas pli eŭropa ol ĝi efektive estas. Rilate la landan, ne internacian, organizitecon, la Internacia Lingvo en Sud-Ameriko proporcie estas disvastigita almenaŭ kiel en Eŭropo. Tie, do, temas unuavice pri niaj neglekto, mismezuro kaj malatento tiurilate.

provoj pacigi la gvidantojn de Brazila Esperanto-Ligo kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj (landa asocio de UEA). En Marilia, 460km nordokcidente de San-Paŭlo, inter la 17a kaj 22a de julio ĉi-jare, okazos la Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto, sub aŭspicioj de UEA kaj la ŝtatestro de San-Paŭlo. Oni jam havas senpagajn kongresejon, loĝigon kaj transporton de San-Paŭlo. La Kongreso ricevis subvencion de ĉ. 15 000 gld. Oni nun klopodas, pere de ambasadoj, certigi partoprenon el ĉiuj sudamerikaj landoj, en la kadro de kulturaj interŝanĝoj. UEA planas organizi karavanojn el Nord-Ameriko kaj Eŭropo al Marilia.

Urugvajo: Post la morto de kelkaj eminentuloj movadaj (M. Fernández Menéndez, E. Sonnenfeld), lamas la landa organizo tie. Alberto Baroccas, siatempe eldoninto de *Kemio internacia*, kun kelkaj aliaj planas reaktiviĝon de Urugvaja Esperanto-Societo.

Argentino: S-ino Grattapaglia renkontis sepdekon da personoj en la sidejo (propra) de Argentina Esperanto-Ligo (300 membroj). Du-mil-voluma Esperanto-biblio-

Deputito Freitas Nobre, per sia leĝpropono pri Esperanto, provokis en oktobro 1977 45-minutan debaton pri la Internacia Lingvo en la Federacia Parlamento de Brazilo.



teko funkcias ĉiutage. Sciencista grupo ASTER aranĝas prelegojn kaj eldonas bultenon, kio altiras konsiderindan ekstermovadan atenton. Ĉiujare okazas landaj kongresoj kaj kantfestivaloj. Spertiĝas relative vigla eldona aktiveco. Kelkdeko da argentinanoj planas veni al Marilia. Pluraj lokaj grupoj viglas, pleje tiu en Rosario.

Ĉilio: En Santiago funkcias du E-kursoj. UEA-delegito Ivan Mättig kaj lia juna helpanto Jorge Tachauer regule kunvenigas klubon, kiu kontaktas ankaŭ kelkajn unuopulojn en aliaj landpartoj. Oni sentas izolitecon de la Movado kaj grandan mankon de instrumaterialo.

Bolivio: Grupoj ekzistas en la ĉefurbo La Paz kaj en Cochabamba. Ĉio estas rezulto de la laboro, kiun dum kelkaj lastaj jaroj faris juna juristo José Roberto Arze. Unu el liaj kursoj okazis en la Filologia Fakultato en La Paz, kie s-ino Grattapaglia interparolis kun la estro de la koncerna katedro. Arze devenas el tre konata bolivia familio kaj havas escepte bonajn sociajn kontaktojn. Li planas aktivigi landan organizaĵon. Simile al Ĉilio, en La Paz oni apenaŭ havas Esperantajn librojn kaj la tutan instrumaterialon devas pretigi la instruanto mem.

Peruo: La vigliĝo de la Movado en tiu lando ŝuldiĝas al la aktiveco de s-ino Janette de Skotte, francino, kiu dum la lastaj sep jaroj vivas en la perua ĉefurbo. Nun ŝiaj lernantoj — plimulto estas gejunuloj — entuziasme aktivigas por Esperanto. En du tagoj tie, s-ino Grattapaglia renkontiĝis kun grandaj Esperanto-grupoj en komerca lernejo kaj la sidejo de filozofia movado "Granda Universala Frateco". La nacia televido intervjuis s-inon Grattapaglia dum la ĉefa vespera novaĵ-

programo. Bonan efikon havis la fakto, ke la intervjuon interpretis C. Alegria, filino de fama perua verkisto. Fondiĝis nova landa asocio, kiu jam petas aliĝon al UEA.

Ekvadoro: La Movado tie estas tute nova. Okazis nur kelkaj kursoj, sed jam kreiĝis studenta Esperanto-klubo en la Centra Universitato de Ekvadoro. La motoro de la aktiveco estas d-ro Patricio Zurita, juna biologo, kiu estras fiziologian fakon de la Medicina Fakultato. *El Comercio*, la plej granda ekvadora ĵurnalo, aperigis intervjuon kun s-ino Grattapaglia.

Kolombio: Dum la lastaj du-tri jaroj en tiu lando okazas vera eksplodo de la interesiĝo pri Esperanto. Grupoj nun funkcias en dudek diversaj lokoj. Pasintjare okazis la unua Kolombia Kongreso de Esperanto. Movadaj aktivecoj pleje viglas en Bogoto, Medellín kaj Neiva, kie s-ino Grattapaglia prelegis en la urbodomo, en ĉeesto de la urbestro, direktoro de la radio-stacio kaj multaj aliaj gravuloj. Oni presigis specialajn afiŝojn pri tiu prelego. El Bogoto al Neiva venis juna instruisto, G. Bermudes, kiu profesie instruas Esperanton. S-ino Grattapaglia havis tri radio-intervjuojn en Kolombio. Unu el la plej konataj muzikaj ensembloj (foto sur nia kovrilpaĝo), "Kvara generacio", koncertis por la vizitanta estrarano de UEA. Post Brazilo kaj Argentino, Kolombio havas la plej amasan Esperantomovadon en Sud-Ameriko.

Venezuelo: Venezuela Asocio de Esperanto petas aliĝon al UEA. Lastatempe okazis en Venezuelo multaj E-kursoj kaj tuta lavango da gazetaĵoj, radiaĵoj kaj televidaj intervjuoj pri la Internacia Lingvo, pri kio ankaŭ nia revuo jam plurfoje raportis. La landa asocio eldonas propran gazeton kaj impresas kiel unu el la plej bone funkciantaj landaj organizaĵoj en Sud-Ameriko.

Tri malgrandaj ŝtatoj en la nordo, du Gvajanoj kaj Surinamo, kaj Paragvajo, centre, estas la solaj landoj de Sud-Ameriko, kiuj restis ekster la vojaĝplano de s-ino Grattapaglia, sed — laŭ nia scio — Esperanto ankoraŭ ne penetris tien. Dum sia vizito al Eŭropo, s-ino Grattapaglia transdonis al UEA ankaŭ la aliĝpeton de Meksika Esperanto-Federacio. Eĉ se la sola rezulto de ĉi tiu plurmilojn da kilometroj longa vojaĝo estus la tri aliĝpetoj de la landaj asocioj al UEA, oni devus kontenti kaj kun ĝojo noti, ke okazas io esenca rilate la tutmondigon de la Esperanto-movado. **sm**

Meze de decembro 1977 la ĉefdelegito de UEA en Brazilo, s-ro Giuseppe Grattapaglia (maldekstre), organizis kunvenon de ĉ. 50 UEA-delegitoj el la tuta lando. Ankaŭ tio estas parto de la preparoj por la 66a Universala Kongreso en Brazilo, en la jaro 1981.



Ni ne konsistu nur el poetoj

LA ESPERANTO-MOVADO jam de la komenco havis grandajn kulturajn ambiciojn; sed la kultura agado de la Movado neniam estis ekvilibra. La ĉefaj atingiĝoj troviĝas sur la literatura kampo, sed ankaŭ sur tiu kampo la beletristika aspekto ĉiam superis la aliajn (teatran, sciencon, muzikan), kaj tiu malekvilibro fariĝis ĉiam pli granda. Ĉefe la uzado de Esperanto en scienco kaj por scienco ne respondis al la esperoj, kiujn oni flegis en la komenco. Oni povas memori pri la multaj traktadoj sciencaj kaj teknikaj en Esperanto, kiuj aperis antaŭ la unua mondmilito, pri la fakto, ke la *Fundamenta Krestomatio* enhavas plurajn gravajn sciencajn artikolojn (pp. 169-227 en la 17a eldono), kaj pri la rezolucio de la Franca Akademio de Sciencoj (1924) favore al instruado kaj uzado de Esperanto.

En tiu tempo pluraj gravaj sciencistoj uzadis kaj favoris Esperanton. Ankaŭ hodiaŭ estas kelkaj, sed proporcio ilia nombro estas konsiderinde malpli granda. Nomojn mi ĉi tie ne citu, ĉar la listo riskus esti nekompleta. Sed, eĉ se ĝi estus kompleta, ĝi ne estus tre longa. Oni devas kun bedaŭro konstati, ke la esperantistoj okupas tute malgravan rolon en la scienca internacia komunumo, dum la malo devus esti vera. Rolas kiel internacia komunikilo en multaj fakoj kripligita angla lingvo kun tre limigita vorttrezoro kaj simpligita sintakso, speco de Basic English "adaptita" al la bezonoj de la scienca komunumo. Por matematiko, fiziko kaj ĥemio tio foje sufiĉas, pro la uzado de riĉa simbolaro kaj de teknikaj desegnaĵoj; sed por biologio, kaj ankoraŭ pli por sociologio, psikologio, lingvistiko ktp., tio kondukas al absoluta ekskluziveco de la anglosaksaj skoloj, sekve, al malriĉiĝo de la scienca penso. Ioman reagon kontraŭ tiu evoluo oni povas konstati, ĉar kelkaj aŭtoroj insiste publikigas siajn verkojn en aliaj lingvoj (franca, germana, rusa, hispana, itala), sed ili ankoraŭ ne abundas. Kion povas fari la esperantistoj en tiu situacio? Diversaj agadoj estas imageblaj kaj estis foje provataj. La plej facila, ĉar ebla interne de la Movado kaj per unuopula laboro, estas verkado de sciencaj kaj teknikaj fakaj terminaroj. Aperis jam multaj tiaj verkoj, kelkaj ampleksaj, aliaj modestaj, kelkaj valoraj, aliaj misaj. La vortara agado estas ja interesa, kaj utila, sed ĝi ne estas baza scienca laboro, ĝi efektive nenion diras pri Esperanto kiel scienca lingvo. Siatempe jam Zamenhof genie asertis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj kaj gramatiko — iniciati novan lingvon necesigas verkadon de tekstoj, artikoloj, tutaj libroj, traduke aŭ prefere senpere en tiu lingvo. Tio validas ankaŭ por scienca literaturo: la diversaj terminoj de unu fako prenas klaran kaj precizan signifon nur en detala, ampleksa teksto pri tiu sama fako. Nuraj sekaj difinoj ne sufiĉas; krome, nur verkante ampleksan sintezan tekston oni povas konstati, unue ĉu la koncernaj terminoj estas ĝuste kaj

precize difinitaj, due ĉu mankas gravaj aŭ almenaŭ iel necesaj terminoj.

Laŭ tio, kio estas jam dirita, oni povas kompreni, ke mi konsideras grava la verkadon de sintezaj libroj pri apartaj fakoj. Tiaj jam ekzistas en Esperanto, sed ankoraŭ nur malmultaj. Ni ne jam povas prezenti al la mondo ampleksan scienca enciklopedion internacian, pri kiu ni povus fieri, same kiel ni prave fieras pri la *Esperanta antologio*, aŭ pri la valoraj tradukaĵoj faritaj de vico da talentaj homoj de Grabowski kaj Kabe ĝis Haugen kaj aliaj. Ĉi tie mi povus mencii la librojn de prof. Neergaard, la verkon *Retoriko* de prof. Lapenna, kelkajn aliajn, kaj la plaĉan popularsciencan verkon *Ŝenĝenaj dialogoj* de Fernández.

Alia agado tre utila estas la verkado en Esperanto por fakaj neesperantaj gazetoj aŭ revuoj. Ni honeste konfesu, ke ni ne spertis multajn sukcesojn tiurilate, simple ĉar Esperanto restis ĝenerale malmulte uzata, ĝi ne altiris la atenton kaj emon ĝin studi kaj ekuzi. Same kiel multaj sciencistoj iam interesiĝis pri Esperanto kaj poste malaperis, same diversaj revuoj interesiĝis pri



La aŭtoro de ĉi tiu artikolo, prof. d-ro C. Støp-Bowitz

(vidu la apudan foton), estas prezidanto de Someraj Universitataj Kursoj, vicprezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista, vicprezidanto de UEA kaj ties estraro pri faka agado.

Esperanto, sed ne daŭrigis. Nur kiam la Movado mem zorgis pri eldonado de scienca revuo almenaŭ parte en Esperanto, tio restis, je granda kosto, kompreneble. Tiel aperis dum kelkaj jaroj *La monda lingvo-problemo*, tre faka gazeto, nun aperanta sub la nomo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*. Ĉar la Esperanto-movado kompreneble interesiĝas pri prilingva revuo pritraktanta ĉefe la problemon de babelismo kaj planlingvismo, tiu revuo persistas. Krome, en la ĝenerala scienco aperas jam delonge *Scienca revuo*, la vera organo de la esperantistaj sciencistoj, sed ĝi restas iom izolita fenomeno. *Scienca revuo* estas tre valora, sed ĝenas la fakto, ke ĝi estas ne tre ampleksa kaj ne eliras vaste ekster la rondon de la esperantistaj abonantoj; krome ĝi aperigas nur artikolojn relative mallongajn, pri tre diversaj temoj, pro kio ĝi ne estas ĝenerale interesa por la faka leganto (por ne paroli pri la duba scienca valoro de kelkaj artikoloj). Elstara, sed same izolita fenomeno, estis la memorlibro *Sciencaj studoj* (1958), kiu konsistas el originalaj kontribuoj de vico da sciencistoj diversfakaj. Kio restas por komprenigi al la sciencistoj ĉiulandaj la utilecon kaj altan valoron de Esperanto? Ni havas la Internacian Someran Universitaton (ISU). Ĝi konsistas el unuhoraj prelegoj, ne ĉiuj prisciencaj, kiujn oni ne ĉiam aperigas poste, kaj kiuj ne povas pretendi al plimalpli kompleta aŭ ĝisfunda pritrakto de temo. Neniel mi volas subtaksi la valoron de la ISU, kiu estas nemalhavebla ero de niaj kongresoj; sed ĝi devus esti nur malgranda parto de la esperantista scienca vivo.

Nun mi venas al la kerno de ĉi tiu artikolo. La antaŭaj kritikoj montris kion ni bezonas: sciencan instruadon, se eble universitatan, relative kompletan, kiun ni povus proponi kaj fiere montri al neesperantistoj. Krome, la kursotekstoj devus esti eldonataj, kio ebligus studon en aŭ per Esperanto, kaj ne nur pri aŭ de Esperanto. Nu, tio ekzistas jam de 7 jaroj. En 1970 fondiĝis en Lieĝo, Belgujo, la asocio sen profita celo Someraj Universitataj Kursoj (SUK). Ĝi organizis universitatajn sesiojn en 1972, 1974 kaj 1976, kaj organizas nun la venontan sesion por aŭgusto 1978 (en la programo troviĝas: astronomio, psikologio kaj internacia literaturo; la bel-literatura flanko de kulturo do ne estas ignorata)*. La kursoj de SUK estas tutsemajnaj, kun seminarioj aŭ gvidataj laboroj, donataj de universitatuloj al studentoj aŭ homoj studintaj ĝis universitata nivelo, tute en Esperanto. La kursotekstoj estas eldonataj, kaj ni povas aserti, ke per ili la scienca literaturo en Esperanto eble duobliĝis. Ĉar temas ne pri fojaj artikoloj aŭ prelegoj, sed pri kursoj, kiujn sekvas ekzameno, la kursotekstoj estas zorge pretigitaj, el vortara, terminologia kaj lingva vidpunktoj. La aspekto estas same enuige akademia, kiel de kiu ajn universitata eldonaĵo. Krome la kursoj okazas en universitato kaj estas anoncataj en la universitataj kaj fakaj gazetoj, tiel, ke la neesperantistoj sciuj pri ili kaj havu la eblecon atenti ilin. Mi aŭdacas diri, ke en la nunaj cirkonstancoj de la Esperanto-movado SUK

estas modela kaj estas la plej taŭga agado por levi la nivelon de Esperanto en la sciencaj medioj. Ĝi jam ne estas nova, ĝi pruvis sian valoron, sed ĝi bezonas la helpon de la Esperanto-movado.

Kiel do ĝi povas esti helpata? Kompreneble finance, ĉar ĝi estas sufiĉe multekosta entrepreno, malgraŭ la klopodoj de ĉiuj membroj redukti la kostojn (i.a. per libervola senpaga laboro, kio ne estas originala en la Movado). Sed la ampleksa korespondado, eldonado, repago de diversaj kostoj ktp., tio estas multekosta. Financa helpo povas okazi, cetere, per aĉetado de la kursotekstoj kaj kajeroj de SUK, el kiuj kelkaj pritraktas temojn, pri kiuj oni malfacile trovas nacilingvajn traktaĵojn. Kroman helpon oni povas doni informante pri SUK ĉe studentoj kaj kleraj homoj, esperantistoj aŭ ne. Ĉi-rilate mi memoras leteron de esperantisto, kiu plendis, ke SUK estas elita aranĝo kaj montras malŝaton al la ordinara esperantisto, nestudinta. Tio estas malĝusta impresio. SUK estas faka organizaĵo, kiel ekz. la fervojista. Ĉu la fervojistoj, ĉar ili havas fakan organizaĵon, kun fakaj renkontiĝoj, malŝatas la ordinaran esperantiston kaj kondutas elitisme? Mi supozas, ke ne. Vero estas, ke agado en sciencaj medioj estas ebla preskaŭ nur al studentoj aŭ studintoj en universitatoj aŭ similaj instruejoj. La kursoj de SUK estas seriozaj kaj altnivelaj, kaj ili aspektas tiaj al la ekstera mondo, ĉar ili donas diplomojn al studentoj aŭ studintoj. Ĉiu, mi supozas, povas aprobi tion, eĉ se li (aŭ ŝi) ne havas altajn diplomojn. La ekzisto de SUK do ne malhelpas, ke okazu aliaj sciencaj aŭ prisciencaj agadoj en la Movado, en kiuj oni malpli zorgu pri diplomoj kaj similaj aĵoj; sed SUK estas necesa, ĝi pruvis tion, kaj tial ĝi meritas helpon de la tuta Movado, ĉu per mono, ĉu per partopreno, ĉu per aĉetado de ĝiaj eldonaĵoj.

Nia Movado ne plu estas tute juna, jam 90-jara, kaj ĝi montras signojn de tio: ĝi ne plu havas la saman vigecon, kiel en sia juna tempo. Tamen kelkaj signoj montras, ke nova sango envenas, nova vigecko, ke eble la Movado nun ne plu stagnas, sed denove progresas. Per ĉiuj rimedoj ni helpu al tiu progreso. La Esperanta popolo estu kompleta kaj ne konsistu nur el poetoj. Ankaŭ sciencistoj necesas kaj utilas. Helpu nin, kaj ni helpos vin.

C. Støp-Bowitz

DE LA 19a
ĜIS LA 25a
DE FEBRUARO:

**Semajno
de
internacia amikeco**



* Vidu apartan anoncon pri la ĉi-jara sesio de SUK en la fino de ĉi tiu numero.

En la Okcidento — io nova

UNU EL LA FOKUSOJ de nia poresperanta aktiveco troviĝas en la okcidenta Eŭropo. Tie kreiĝis relative potencaj instancoj, konataj sub la nomo Eŭropa Komunumaro (EK) — aŭ pli simple "Eŭropo de la Naŭ". La sidejo de EK estas en Bruselo, kiu rimigiĝas kun Babelo. Tio ne estas nur formala rimarko, ĉar ĉiam pli evidentiĝas, ke en EK ekzistas lingvaj problemoj, kiuj daŭre komplikiĝas pro eniro de novaj membroj*. Tio ne plu estas sekreto por la gazetaro kaj la fakaj medioj.

Kvankam temas pri regiona agado, UEA, jam de multaj jaroj, aktive interesiĝis pri la evoluo de la agado sur tiu kampo. Sed la interesitoj mem, la landaj asocioj apartenantaj al tiu parto de Eŭropo, dise aŭ komune agadis kaj notis diversajn sukcesojn. Montriĝis necesa aktiveco racia kaj kunordigita, kio ekzemple kondukis, okaze de komuna kongreso en Luksemburgo (1973), al fondiĝo de "Eŭropa Esperanto-Centro", kies agadon rekonis UEA kaj al kiu ĝi donis moralan — pere de Institucio Hodler 68 ankaŭ materialan — apogon. Tiu Centro, kiel servo de la koncernaj landaj asocioj, iniciatis aŭ realigis serion da agadoj, unuavice per ĝenerala informado pri la lingvo kaj la Esperanto-movado, en direkto al la eŭropaj instancoj, al la gazetaro, al diversaj respondeculoj aŭ fakuloj. Ĝi provis kunordigi la laboron, ekzemple kiam urĝis rebatado al misprezentoj pri la Internacia Lingvo. Ĝi kunlaboris kun organizaĵoj favoraj al eŭropa integriĝo, inter kiuj Centro por Eŭropa Edukado, el kio rezultis eldonado de la revuo *Eŭropa dokumentaro*.

Tiu "Eŭropa Esperanto-Centro" tamen ne estis sufiĉe strukturita por pli ampleksa agado. Esence nur du personoj kontribuis al ĝia gvidado. Kiel prezidanto de tiu Centro, mi devas substreki, ke la pezo de la farita laboro kuŝis preskaŭ ekskluzive sur la ŝultroj de la administrantino, s-ino J.H. Hoekstra-Sieders. Spite malavantagon de loĝado for de la bruselaj instancoj, ŝi daŭre kaj kuraĝe agis, kun rimarkindaj klereco kaj sindediĉo. La amplekso de la perspektivoj postulis reformon de nia labormaniero. Dum UK en Rejkjaviko, kunsido de reprezentantoj de la landaj asocioj, laŭ propono de G. Leon-Smith, decidis pri starigo de "Eŭropa Esperanto-Unio", tegmenta organizo de la landaj asocioj, kies landoj estas membroj de EK. Ĝin gvidas instanco kunmetita el la prezidantoj de tiuj landaj asocioj. Laŭvice, unu el ili funkcias kiel prezidanto de la Unio, la aliaj kiel vicprezidantoj.

* V. detalan prezenton de tiuj problemoj en la ĵus aperinta "La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro" de Werner Bormann (*Esperanto-dokumentoj* de UEA, n-ro 8).

Tro malrapida kaj tro peza en certaj okazoj povus esti la funkciado de tiu Unio. Necesas pli movebla ĉelo, kun agada sidejo en Bruselo mem. Laŭbezzone ĝi servos al UEA, la Unio, la landaj asocioj kaj ĉiuj organizaĵoj sur la eŭropa kampo. Tiu formaĵo, kiu prenis la nomon **Eŭropa Esperanto-Centro, sekretariato de Eŭropa Esperanto-Unio**, en urĝaj aŭ favoraj cirkonstancoj ankaŭ memstare agos. Ĝin laŭleĝe gvidos unu konsilio kaj unu administrantaro, kiuj konsistos el fakuloj sur la eŭropa tereno. Ĝi havos statuton de societo sen profita celo, rekonota kiel tia fare de la belga ŝtato. Oficejo por la Centro estas je dispono en la mezo de Bruselo. Ĝin gvidos s-ro G. Maertens, estrarano de UEA, helpe de deĵoranta oficistino, s-ino S. Catling.

La laboro por Esperanto sur la eŭropa kampo estas do nun taŭge ekipita. Realigotaj taskoj ne mankas: de la organizado de intervenoj kaj kontaktoj kun oficialaj instancoj ĝis la kunmeto de novaj agadplanoj.

Aliaj malpli ĝeneralaj centroj aliloke funkcias. En Luksemburgo, kie kunsidas la parlamento de EK — "baldaŭ" balote elektota kaj dotita per pli granda decidpovo — funkcias ankaŭ aktiva centro, sub gvido de pastro H. Kindler. En Strasburgo, sidejo de alicela eŭropa instanco, — "Eŭropa Konsilio" —, subtenata de pli-malpli 20 landoj, aktivas grupo da fervoruloj. Aliflanke la Eŭropa Klubo de Paderborn (FR Germanio) akceptis daŭrigi la eldonadon de *Eŭropa dokumentaro*.



Pastro Hans-Jörg Kindler jam kelkajn jarojn estas la ĉefa aganto por Esperanto en Luksemburgo. Lastatempe li provizore liberiĝis de siaj aliaj devoj kaj komencis plentempe okupi sin pri la Movado.

Ne mankas al ni kialoj por sukcesi. Fronte al niaj relative malfortaj organizaĵoj staras potencaj oficialaj instancoj, bone kirasitaj, sed ne kun sendifektaj ŝirmiloj. Lingva diskriminacio, ĉiam pli akriĝanta pro fakta hegemonio de unu aŭ du lingvoj el la 6 oficialaj, venas la internan atmosferon de EK. Sed la esenca manko kuŝas en la terure altaj elspezoj por tradukaj kaj interpretaj laboroj. La kreskantaj kostoj nepre kreas krizan situacion, kaj tiam ni devos esti tute pretaj por helpe interveni. Ĉu paradokso? Ĉu ni, idealistoj, subtenataj de la interna ideo de komuna lingvo, metas nian esperon en la malvarmon de la financaj sekvoj de blinda lingva politiko? Ne apartenas al ni elekti la terenon por nia lukto.

D-ro Pol Denoël,
prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

Angloj lernu la francan por kun norvegoj ferii en Hispanio

La sekva teksto alportas nenion novan. Ni preskaŭ devas pardonpeti al la legantoj pro la fakto, ke ni aperigas ĝin. Tamen, estas utile refoje ekzameni la "opinion" de aliaj, eĉ kiam ili efektive ne havas opinion, kiel okazas kun pluraj debatintoj en Strasburgo, kiuj sukcesis eldiri tutan aron da absurdaĵoj pri la lingvo-problemo. Ni ja ĝoju, ke Eŭropa Konsilio okupiĝas pri ĉi tiu temo, sed ni malĝoju, ke ĝi faras tion tiel diletante, absurdece kaj anakronisme.

LA 5an DE OKTOBRO 1977 en Strasburgo (Francio), kunsidis la Parlamenta Asembleo de Eŭropa Konsilio, por diskuti raporton "pri la vivantaj lingvoj en Eŭropo". La raporton ellaboris la Komisiono por Kulturo kaj Edukado (KKE), kies raportanto estis s-ro Piket (Nederlando). La Asembleo devis voĉdoni pri rekomendo-projekto (Dok. 4018), kiun ni resumas en la kadro apude.

Parolante en la franca, s-ro Piket komence emfazis la gravecon de la lingvoj en la nuna epoko: Oni bone sciis fremda(j)n lingvo(j)n — malgraŭ pena lernado — sed ankaŭ ne neglektu la gepatran; oni eĉ fieru pri ĝi. Ĉiu lingvo kaj dialekto gravas, ĉar ĝi estas parto de iu kulturo kaj ebligas esprimi specifajn pensojn. Tiu diverseco, laŭ s-ro Piket, kaŭzis jam en 1961 kaj 1962, ke la eŭropaj kulturministroj deklaris la bezonon favori la lingvoinstruadon. Li asertis pluan aktualecon de tia bezono. Menciante Esperanton s-ro Piket argumentis, ke kio mankas al ĝi, tio estas kultura fundamento, kiun havas la eŭropaj lingvoj. Aldonindas, ke li tamen konfesis sian nescion, ĉu Esperanto estas facile lernebla... Lia konkludo el ĉio ĉi estis, ke necesas lerni almenaŭ unu fremdan lingvon, "kiu kondukas al aliaj horizontoj". Aludante la problemon de gastlaboristoj li deklaris, ke tiu ĉi sistemo ebligas al laboristoj transpaŝi la sojlon de nepropa kulturo.

Fine, s-ro Piket esprimis esperon, ke la nuna kaj venonta generacioj, ellerninte almenaŭ unu fremdan lingvon, povos "disiri tra Eŭropo, vojaĝi ĉirkaŭ la mondo kaj koni la kulturojn de aliaj landoj".

Inter la assembleanoj, kiuj komentis la raporton, pluraj reagis al la mencio pri Esperanto. S-ro Brugnon (Francio): Esperanto estas lingvo tro ofte subtaksata; ĝi estas pli praktikata ol oni ĝenerale supozas; ĉiujare

okazas kongresoj. Ĝi ne atencas la naciajn lingvojn kaj civilizaciojn kiujn ili reprezentas, sed ĝi estas **helplingvo!** Lernante unu fremdan lingvon oni paŝas al unu sola civilizacio. S-ro Brugnon sciigis, ke li mem uzis Esperanton dum la junaĝo kun alilandanoj; ke dank' al multaj tradukoj li povis legi verkojn de hungaraj poetoj; ke multaj afiksoj faciligas tujan komprenon... Laŭ li, Eŭropa Konsilio disponas nun **eŭropan** interlingvon kreitan en Pollando! Li petis de la Konsilio ne malakcepti la raporton, sed tamen antaŭvidi la iaman uzon de internacia helplingvo, ekz. Esperanto, aŭ de alia, kiel Volapük! Necesas racia, komprenebla lingvo: Esperanto povas esti ĝi.

Poste s-ro Beith (Britio) rimarkigis, ke Esperanto ne akiris la popularecon esperitan de ĝiaj adeptoj. Li bedaŭris la mallernemon de siaj samlandanoj rilate aliajn lingvojn: La brita instrusistemo malsukcesis tiurilate, kvankam la fremdlingva instruado estas vivbezono por internacia kunlaborado. Male, iuj nacioj akiris bonajn rezultojn! S-ro Beith fine substrekis mallogikaĵon: En lia regiono la infanoj lernas la francan, dum ili ferias plej ofte en Hispanio kaj renkontas multajn norvegojn; la precipeco de la instruado de la franca en Britio kaj de la angla aliloke estas laŭ li bedaŭrinda fakto. Alia franca reprezentanto, s-ro Lacombe, apogis

LA DOKUMENTO 4018

Ĝi konsistas el 2 partoj. La unua entenas pli-malpli la argumentojn uzitajn de s-ro Piket dum lia prezento al la Asembleo. Oni rimarku en ĝi opinion de profesoro, ke necesas lerni **tri** lingvojn, aŭ la esperon de la raportanto, ke la Asembleo subtenos lian oponon kontraŭ la elekto de "artefarita solvo" kiel Esperanto. La apuda resumo montras, ke tiu opinio ne estas ĝenerala. La fino de la unua parto notas elreviĝon spertitan pri la du kutimaj instrusistemoj: La lernado de gramatiko kaj vortprovizo katenas la parolesprimivon, ĉar ĝi akcentas la ĝustecon, ne la komunikadon; la aŭdvidaj rimedoj instigas la lernanton ripeti papage, ne uzi kreive lingvon laŭ propraj bezonoj. La dua parto entenas priskribon de nova lingvoinstrua sistemo priatentanta la bezonojn de la lernantoj. Tiu sistemo postulas disgrupigon de la lernantoj: ĉiu elektas grupon kaj asimilas diversajn "unuojn", kiuj konsistigas la "sojlan nivelon", kiun oni celas. Aldoneblas pluaj unuoj laŭ bezono. Unuon post unuo, lernanto amasigas sian "trezoron"; tial oni parolas pri "sistemo de kapitaligeblaj unuoj". Kio karakterizas la sistemon, tio estas do ia adaptebleco: ekz. la sojla nivelo de lernejoj estas kapablo skribi fremdlingve, dum tiu de plenkreskuloj estas, komence, la parola komuniko. Tia laŭbezona lernado estas taksata pli racia. Plie, "ĝi ne favoras la adopton de artefarita mikslingvo, kiel Esperanto, kaj ankaŭ ne implicas, ke ajna lingvo, ekz. la angla, estiĝu plej influa".

s-ron Brugnon pri lia propono de Esperanto, kaj mem proponis eĉ la **latinan** kiel solvon: ĝi estis la lingvo de la tutmonde disvastigita katolika eklezio kaj nuntempe ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj uzas ĝin internacie. Li ankaŭ, fine, insistis pri la graveco de la regionaj lingvoj, konservindaj apud la aliaj (naciaj, fremdaj).

Menciinda estas la opinio de s-ro Reid, membro de la Skota Nacia Partio: Ridinde estus konsideri Esperanton la interlingvo de Eŭropo, ĉar tiun servon jam plenumas la angla. Tamen, Esperanto vivadas kaj estas uzata de

firmaoj kaj internaciaj foiroj, i.a. en Azio.(!?) Ĝi do ebligis rilatojn kun aziaj landoj. Tial li diris, ke s-ro Piket traktis ĝin "tro senpripense".

La lastaj resumaj vortoj koncerne la temon de la debato estis tiuj de s-ro Aano (Norvegio), vicprezidanto de la komisiono. Tiuj vortoj estis proksimume la samaj kiel la jam aŭditaj: Necese koni unu kroman lingvon, manko de "kultura fono" al artefaritaj lingvoj, kvankam ili povus utili kiel komunikiloj.

Resumis: **Thierry Lelogeais**

AGADPLANO PRI EDUKADO:

Plenkreskuloj en la fokuso

Foto: EFA/Markarian



EN LA NUNA OFICPERIODO la Estraro de UEA decidis sisteme okupi sin pri la evoluigo de la instruado de Esperanto en la eksterlernejaj medioj, konsiderante, ke la lernejan kampon efike kultivas la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. En la lerneja sfero la Estraro de UEA esperas kunlabori kun ILEI en la jam interkonsentitaj kaj interkonsentotaj formoj.

I. Konsiderante la aktualajn bezonojn de la internacia E-movado, la Estraro de UEA decidis koncentri siajn streĉojn kaj la plej proksiman agadon sur la demandojn, kiuj celas evoluigon de:

1. diversgrada memlernado laŭ apartaj edukplanoj el-laborotaj speciale por aŭtodidaktoj,
2. studrondoj,
3. korespondaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj en kunlaboro kun koncernaj E-organizaĵoj,
4. eksterlernejaj kursoj (ĉefe en plenkreskulaj medioj),
5. metodoj de priksura informado kaj varbado al la kursoj kun konsidero al la postuloj de la teorio de informado kaj reklamado,
6. instrumentoj de Esperanto kun aparta konsidero al la plenkreskulaj medioj (interŝanĝado de spertoj, lanĉado de valoraj kaj modernaj instruteknikoj ktp.),
7. edukado de estontaj kursgvidantoj,

8. iniciatado de porkursaj materialoj (libroformaj kaj broŝuraj eldonaĵoj, diskoj, kasetoj k.s.) precipe kun kleriga enhavo.

II. La Estraro de UEA (kunlabore kun ILEI) — por realigi siajn celojn —, pere de la estrarano pri edukado, Konsulta Komisiono pri Edukado kaj kunlaborantoj, intencas:

1. esplori la aktualan situacion sur la kampo de la instruado de Esperanto al plenkreskuloj en diversaj landoj,
2. ellabori — surbaze de esplorrezultoj — laborprincipojn kaj efikajn metodojn, kiuj antaŭenigos la instruadon,
3. iniciati novajn paŝojn, kiuj unuflanke plialtigos la lingvonivelon de la membraro kaj aliflanke kontribuos al la disvastigo de la lingvo, speciale en la landoj, en kiuj ne ekzistas organizita Esperanto-movado.

La Estraro kredas, ke paralela agado en lernejoj kaj plenkreskulaj medioj kaj ankaŭ en la medioj de eksterlerneja junularo pliefikigos nian laboron en monda skalo kaj donos pli da pozitivaj rezultoj al la Movado.

UEA en sia agado en plenkreskulaj medioj specialan atenton direktos al varbado de profesiaj instruistoj por havigi al la Movado pli da pedagogoj.

Roterdamo, 1978 01 08

Estrararo de UEA

TEJO-ESTRARO EN ROTENBURG:


Kunsidi ĝustaloke

NE NUR la Estraro de UEA kunvenas jarkomence, ankaŭ TEJO-estraranoj kutimas dum la lastaj jaroj renkontiĝi en la jarŝanĝaj tagoj. Ĉi-foje la TEJO-estraro kunsidis dum la 21a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu altiris pli ol 100 partoprenantojn al Rotenburg ĉe Kassel. En TEJO-vespero, la 8 ĉeestantaj estraranoj parolis pri siaj laborterenoj kaj varbis por ili. Lumbildoj pri la kongreslando kaj skeĉoj kompletigis tiun programon.

La eksteraj rilatoj de TEJO ricevis en la kunvenoj ampleksan trakton (serĉo de deĵoranto por la KER-oficejo, novaj aktivuloj, seminario kun polaj studentoj, reprezentigo en konferencoj). La Estraro atente studis membrostatistikajn enketilojn de la landaj sekcioj, kaj post la kunsidoj laboris por sendi pli ol 40 leterojn petante kompletigajn informojn.

Kontakto okupis gravan lokon en la kunsida tagordo. La Estraro akceptis kontraktojn pri kunlaboro inter *Kontakto* unuflanke kaj *Literatura foiro* kaj *Kancerkliniko* aliflanke. Oni konstatis, ke pli ol la malfruo, ĝenas la malalta nombro de abonantoj de *Kontakto*. La Estraro faris tiurilate du konkretajn proponojn: starigo de kolektivaj abonoj por netranspagipovaj landoj kaj ebligo al la organizantoj de seminarioj kvante mendi unuopajn numerojn, kiuj traktas la seminarian temon.

Oni aprobis la eldonon de afiŝo por akompani la ĵus aperintan TEJO-varbilon "Kunvenoj". Post tio, la Estraro taksis prioritata la aperigon de nacilingva varbmateriale direktita specife al junuloj. Reeldono de la 6-lingva flugfolio kaj pretigo de hispanlingva varbilo por Latinameriko estis konsiderataj. La estrarano pri la agado en Latinameriko raportis, ke li kontaktis plurajn junularajn grupojn en tiu mondparto. TEJO akceptis



Pli ol evidente — unueco regas en la Estraro de TEJO: De maldekstre: MacGill, Lendvay, Van Tongerloo, Tsiturides, Cappa, Bormann, Gabalda kaj Casini. Cetere, bone ke al Rotenburg ne venis ĉiuj estraranoj, ĉar la lito ne eltenus.

subvencipeton de la brazila junulara sekcio (BEJO) por teatra prezento en la Unua Latinamerika Kongreso en Marilia (julio 1978), kie BEJO varbos ankaŭ por TEJO, helpe de materialo kiu inkluzivos lumbildserion pri la pasinta IJK.

Sed pri la venonta IJK, por kiu aliĝiloj estas daŭre haveblaj, la Estraro rimarkigas, ke krom kongresanoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Soveta Unio, kiuj pagas la kotizojn en bulgaraj levoj, ĉiuj aliaj **devas** pagi laŭ la guldena tarifo al la kongresaj perantoj aŭ al la Centra Oficejo. Oni bv. sendi la pagon kaj la aliĝilon al la **sama adreso** (kontraŭe al la instrukcio en la aliĝilo mem). La Estraro kaj LKK akceptis la proponon de *Literatura foiro* enprogramigi la proklamon de la "Verko de la jaro" en Veliko Tarnovo. Oni notis, ke du landaj sekcioj interesiĝas pri la organizado de la 35a IJK en 1979.

La Estraro traktis kelkajn gramatikajn kaj teknikajn ŝanĝojn en la nova Statuto de TEJO. La rezultoj de poŝta voĉdonado montris, ke la TEJO-komitato aprobis la novajn komitatan kaj kongresan regularojn. Fine de la 17 horoj da kunsidado, oni surpaperigis laborplanon por la periodo ĝis la IJK. La Estraro de TEJO denove kunvenos en Italio fine de marto ĉi-jare, okaze de tiea junulara E-festivalo. Junularaj aranĝoj estas sendube la ĝusta loko por kunvenigi la Estraron de la junulara sekcio de UEA.

tb/smac

Okazis seminario, pretiĝas labortendaro

JEJA, kiel mallongiĝas la oficiala nomo de la landa sekcio de TEJO en Jugoslavio, ne tiom ofte anonciĝas per internaciaj aranĝoj. Tamen, la filioj de JEJA en Zagrebo kaj Sarajevo restas inter la plej aktivaj junularaj kolektivoj en la mondo.

En Medulin, apudmara loko en Jugoslavio, okazis inter la 30a de decembro 1977 kaj 3a de januaro 1978 seminario pri etiopia kulturo. La seminarion organizis Studenta Esperanto-Klubo (SEK) el Zagrebo. La prelegantoj estis etiopiaj studentoj, kiuj studas en Jugoslavio, kaj d-ro Ivo Borovečki, kiu kvin jarojn vivis en Adis-Abebo. La prelegojn aŭskultis 45 esperantistoj el diversaj lokoj de la lando kaj kelkaj eksterlandaj gastoj (el Bolivio, Greklando kaj Francio). Dum la seminario la Drama Sekcio de SEK aranĝis prezenton de *Nevidebla Leonardo* de Norma Ŝerment.

El Sarajevo oni anoncas la organizon de internacia labortendaro en aŭgusto ĉi-jare. Kiel kutime en Jugoslavio, kiu havas longan historion kaj bonan renomon en la organizo de junularaj laboraranĝoj, temos pri serioza laboro dum ses horoj tage, kaj pri ne malpli serioza kultur-amuza aktiveco dum la resto de la tago. La sola oficiala laborlingvo de tiu internacia aranĝo estos Esperanto. Detalojn bv. peti antaŭ la fino de aprilo (limdato) de: JEJA (por laborbrigado), Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

Dudek mil gld. el paperkorbo

Multaj membroj tion faras, sed pli multaj verŝajne opinias la kolektadon de uzitaj poŝtmarkoj ne tre grava financa subteno al la Asocio. Kiom erara estas tiu starpunkto, evidentiĝas el la ĉi-suba teksto. La teksto estas instrua por la jamaj kolektantoj, kaj ĝi estu invita por novaj bonvolemluloj.

ATENTAJ LEGANTOJ de la spezkontoj de UEA povos rimarki, kiam aperos la kontoj por la pasinta jaro 1977, ke komencis rekreski la enspezoj el poŝtmarkvendado. Jam de multaj jaroj, membroj kaj simpatiantoj de UEA tra la tuta mondo sendadas uzitajn poŝtmarkojn, kiujn ili kolektis de sur siaj korespondaĵoj, el siaj oficejoj aŭ de parencoj kaj amikoj, donace al UEA, kiu poste disvendas ilin favore al la ĝenerala kaso de la Asocio. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam tiun disvendadon prizorgis en Danlando s-ro P. Zacho, la sumo de la enspezoj regule atingis tri mil guldenojn jare. Poste la vendado stagnis, ĉar mankis kunlaboranto, kiu disponus ne nur pri la filatelaj scioj sed ankaŭ pri la necesa libera tempo, kiun tia laboro postulas. Nun troviĝis tia homo en Nederlando mem, kio estas tre oportuna solvo, ĉar ĝi signifas, ke li povas regule viziti la Centran Oficejon por tie trarigardi la stokojn, ordigi la poŝtmarkojn kaj mem forporti ilin por disvendo. La kosto de sendado de grandaj poŝtmark-pakaĵoj al Danlando aŭ alia lando nun do estas ŝparata. Tiu nova kunlaboranto estas s-ro Fred de Geus, kaj ni kaptis la okazon de unu el liaj lastaj vizitoj al la CO por starigi al li kelkajn demandojn.

Demando: Kiel vi venis al la ideo vendi poŝtmarkojn por UEA?

Respondo: Stefan MacGill, kiu laboras en la Centra Oficejo, rakontis en kunveno de Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ), ke dum pluraj jaroj malmulto estis farata pri vendo de la poŝtmarkoj. Mi mem okupiĝas pri poŝtmarkoj jam de 10-jara aĝo, kaj mi tre interesiĝis. Ĉeestis ankaŭ pluraj aliaj NEJ-anoj, kiuj estas filatelistoj. Mi sciis, ke en la lastaj du jaroj, precipe, okazis grandega kresko en la filatela komerco, precipe en Nederlando.

Ekzemple, de multaj nederlandaj poŝtmarkoj la valoro tri- aŭ eĉ kvin-obliĝis en la lastaj jaroj. Mi do vidis grandajn ŝancojn por ion entrepreni pri la poŝtmarkoj de UEA.

D: Kial okazas tia subita kresko de la filatelo?

R: Multaj homoj nuntempe serĉas rimedon por kontraŭbatali la malplivaloriĝon de la mono. Aliaj investoj, ekzemple en akcioj kaj obligacioj, perdis la duonon de sia valoro en la lastaj jaroj. Poŝtmarkoj subite fariĝis tre interesaj kiel solida formo de investo. Povas okazi, ke la nuntempa kreskado de la valoro de poŝtmarkoj malrapidiĝos, sed ĝi tamen verŝajne ne falos sub la nivelo de normala banka rento.

D: Kion vi povas diri pri la stoko, kiu akumuligis ĉe UEA?


R: Mirigis min la amaso, vere grandega stoko. En la unuaj du monatoj mi jam vendis por ĉ. 500 gld., kaj oni apenaŭ rimarkas ian ŝanĝon en la restanta kvanto. Mi taksas, ke nur la usonaj valoras du mil guldenojn. Eble la tuta stoko valoras pli ol dudek mil gld. La fakto, ke dum kelkaj jaroj UEA malmulte vendis, certe ne estis perdo, ĉar ĝuste en tiuj jaroj la poŝtmarkoj ĝenerale plivaloriĝis. Do tiu stoko estis bonega investo por UEA, kies fruktojn ĝi nun povos rikolti.

D: Kiuj poŝtmarkoj estas la plej facile vendeblaj?

R: Nu, unuavice ĉi tie la nederlandaj poŝtmarkoj. Estas vere freneza situacio nun, freneza aĉetado. Precipe ĉiuj kolektantoj petas neuzitajn nederlandajn markojn de antaŭ 1960. Ili vere multe valoras, kaj multaj kolektantoj kredas, ke ili rapide riĉiĝos. Aliaj ŝatataj landoj por la filatelo estas nun Francio, Britio, Norvegio, ankaŭ aliaj skandinavaj landoj, tute speciale Islando (kies poŝtmarkoj estas ĉiuj specialaj emisioj), Svislando, Aŭstrio, FR Germanio. Ekster Eŭropo, ĉefe gravas Kanado, poste Aŭstralio, Usono kaj Nov-Zelando. Ankaŭ Japanio estas iom ŝatata, certe pleje el ĉiuj aziaj landoj. Oni ankaŭ povas diri, ke ĝenerale la plej valoraj poŝtmarkoj estas tiuj de la landoj kun la plej forta ekonomio. Aliflanke, iuj el la naftoproduktaj landoj, same kiel la orient-eŭropaj ŝtatoj, eldonas grandkvante por eksporto, kun konsekvence malalta valoro por kolektantoj. Bedaŭrinde, en la poŝtmark-paketoj, kiujn niaj membroj sendas al UEA, ofte estas tre multaj regulaj markoj, kiuj vere ne havas valoron, kaj kostas multe da tempo elsarki ilin inter la pli valoraj.

D: Kion signifas "regulaj markoj"?





Fred de Geus (dekstre) klarigas al Stefan MacGill la arton prilabori la uzitajn poŝtmarkojn por la avida merkato.

R: Tio estas la poŝtmarkoj, kiuj estas konstante uzataj. Preskaŭ ĉiu lando havas tiajn ordinarajn poŝtmarkojn, kiuj estas ĉiam haveblaj kaj havas neniun filatelan valoron. Estus do pli bone, se la membroj apartigus tiujn ordinarajn markojn kaj eĉ tute ne sendus ilin, ĉar ilin ni ne povas vendi. Tamen, iuj malnovaj regulaj markoj estas kolektindaj. Do, se oni havas malnovajn, ni volonte ricevos ilin.

D: Ĉu pli valoras poŝtmarkoj uzitaj aŭ neuzitaj?

R: Kutime pli valoras neuzitaj. Kiam temas pri novaj poŝtmarkoj, la valoro por kolektantoj ne multe diferencas de la nominala valoro. Sed ju pli malnovaj estas la markoj, des pli valoraj estas la neuzitaj, ĉar kompreneble ili fariĝas ĉiam pli maloftaj.

D: Multaj membroj demandas, ĉu ili anticipe purigu aŭ senpaperigu la poŝtmarkojn, aŭ ili simple tondu la paperon ĉirkaŭe.

R: Por ni estas granda helpo, se oni antaŭe purigas ilin. Tion ĉiu povas fari sufiĉe facile. Nuntempe ne ekzistas presinkoj solveblaj, do oni ne devas timi, lavante la poŝtmarkojn, ke la inko povas disflui. Oni simple metu la tutan kvanton da poŝtmarkoj, eltonditaj el la kovertoj, en varmetan aŭ eĉ malvarman akvon kaj lasu ilin kuŝi en la akvo, ĝis la papero foriĝas de ili. Kvaronhoro povas sufiĉi. Poste oni elprenu ilin el la akvo kaj fortiru eventuale restintajn paperpecojn. Tion necesas fari tre zorge, ĉar post kuŝado en la akvo la poŝtmarkoj tre facile ŝiriĝas. Se ekzistas inter la poŝtmarkoj ankaŭ paroj aŭ blokoj, do pluraj poŝtmarkoj kunligitaj, oni krome zorgu ne ŝiri la perforaĵon, ĉar en stato kunligita ili estas pli valoraj. Por sekigi la poŝtmarkojn oni dismetu ilin sur ion sorban, ekzemple ĵurnalon aŭ bantukon, sed kun la bildflanko malsupre, por ke ili ne algluiĝu. Kiam ili estas preskaŭ sekaj sed ankoraŭ ne komencis kurbiĝi, oni metu ilin inter purajn paperfoliojn kaj lasu ilin kelkajn horojn sub pezo, ekzemple sub peza libro. Se ĉiuj membroj faros tion, ili ŝparos multan laboron al mi kaj al si mem ŝparos sendokostojn, kompreneble, ĉar la senpaperigitaj markoj pezas multe malpli. Ili ankaŭ bonvolu forigi eventualajn ŝiritajn aŭ difektitajn poŝtmarkojn, ĉar tiuj havas tute nenan valoron.

Recenzoj

Plezura lego

Recenzas Clelia Conterno (Italio):

Venis viro de Torben Nielsen. El la dana trad. G. Riisberg. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 75p. 20cm. ISBN 87 85020 966.

Nia lingvo estas punta lingvo; pro tio, ĉe niaj originalaj verkoj juste ĝuas plenrajton ankaŭ la tradukoj, ĉar ili turnas sin al internacia mezklera publiko kiu neniam estus atinginta la originalon. Do, la elekto de verko fare de la tradukonto ludas gravan rolon, kaj same gravan rolon ludas la boneco de la traduko: ĝi devas esti tia, ke la leganto "forgesu" ĝin kaj opiniu, ke li/ŝi troviĝas antaŭ senpera esprimado; pli ankoraŭ, ke li/ŝi, post iom da tempo, memoru la plezuron kiun li/ŝi tiris el la legado sen plu konscii, ke temas pri libro en Esperanto. Kaj tia estas la kazo de *Venis viro*, en la traduko de Gudrun Riisberg.

Temas pri detektiv-romano, aŭ krimromano, ja ne malofta speco: sed tie ĉi la enhavo kaj ĝia prezento atingas la verton de l'artismo. En nebula nokto, filo deknaŭjara vokas telefone sian patron, kiu ne povas atingi lin de sesdek-kilometra foro. La patro povas nur trovi, ke oni mortigis lian Kim, kaj fariĝi mem detektivo por trovi la kulpintojn, kio estas cetere tre antaŭvidebla. Sed la tuta romano estas trakurata de subtila priploro por la dek naŭ belaj fortikaj amindaj jaroj de Kim, kiu ne meritis morti, kaj la temo estas ne tiom la serĉado de murdisto, kiom la tragedio de la kompaktinda patro.

Mi sen honto konfesas, ke mi ne povis flankenmeti la romanon antaŭ ol mi finis, kaj ne pro la kanvaso aŭ la premaj momentoj, sed pro la intima sento de ribelo al la sorto de tiu deknaŭjarulo, kvazaŭ la historio estus vera. Vereco: malfacila kvalito en krimromanoj. Se entute *Venis viro* povas esti konsiderata krimromano.

Mendu ĉe UEA: 6,60 (por Nederlando 6,86) gld., plus sendokostoj 10%.

Perlo flandra

Recenzas W.A.M. van Heugten (Nederlando):

Kristnaska triptiko, de Felix Timmermans (1886-1947). El la nederl. trad. (1937) E. Paesmans. Antverpeno: La Verda Stelo, 1977 (2a eld.). 48p. Ilus. 18cm.

Bona vino ne bezonas kronon, diras nederlandlingva proverbo. Ĉi tiu triparta rakonto de ankaŭ ekster la teritorio de la nederlanda lingvo fama verkisto Felix Timmermans estas vera literatura perlo. Post mallonga aŭtobiografio, la flandra aŭtoro, kiu profesie estis pentristo kaj mem ilustris siajn verkojn, priskribas, en la tri paneloj de ĉi tiu triptiko, korvarmige la aventurojn de tri simplaj viroj, kiuj, laŭ malnova kutimo en Flاندrujo, kiel Trireĝoj, kun turniganta stelo, kolektas ĉiun vintron iom da trinkaĵo kaj manĝaĵo.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld., plus sendokostoj 10%.

Kupro anstataŭ oro

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Tonio Kröger. Thomas Mann. Tr. Ŝiger Ujeki, postkorektis W. Schmidt. Tokio: Zamenhofa Klubo, 1977. 89 + 4p. 18cm.

Ĉu ne mirige, ke traduko el unu el la plej gravaj germanaj verkistoj de ĉi tiu jarcento venas al ni el... Japanio? Ĉu la kontraŭnaziisma sinteno de Thomas Mann siatempe tiom influis, ke oni en Germanio ne sukcesis traduki ĉi tiun majstran novelon (aperintan jam en 1903)? Aŭ ĉu simple la germanoj ne scias traduki?

Tonio Kröger bildigas la suferigan duecon kiun travivis ankaŭ la aŭtoro: burĝo-komercistido unuflanke kaj artisto-verkisto aliflanke. Ĝi en aliaj verkoj de Thomas Mann estas sentebila, sed pleje ĝin reliefigas ĝuste *Tonio Kröger*. Ankaŭ en tiu ĉi traduko. La stilon de Thomas Mann karakterizas ironio kaj delikata pentrado de detaloj. Tiujn vi retrovos en tiu ĉi tokia versio. Sed plia

karakterizilo estas lia plejpreciza lingvouzo, en kiu ĉiu vorto estas pesita kiel orgrajneto. La tradukinto disponis nur pri arĝento kaj kupro: tro ofte la traduko estas ĝusta anstataŭ trafa. Sed, vi ja ne metos la originalon apude. Leginda verko el la mondliteraturo.

Mendu ĉe UEA: 12,30 (por Nederlando 12,79) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

El la japana moderna poezio. El la japana tradukis M. Miyamoto (1913-). Kompilis Y. Mine. Kioto: L'Omnibus, 1977. 114p. 19cm. De la romantismo ĝis la metafiziko. Inkluzivas plurajn prozpoemojn. Prezo: 12,60 gld.

Eŭropa kalendaro 1978. Redaktis kaj ilustris Brigitte Frank-Böhringer. Paderborn: Eŭropa Klubo, 1977. 29cm. Unu folio por ĉiu semajno. Ĉe ĉiu dato staras vorto grandlitere en Esperanto, diklitere en la latina, kaj flanke en la germana, angla, itala, franca, nederlanda, dana kaj irlanda lingvoj, kun ilustra desegnaĵo. En la samaj lingvoj aperas nomoj de monatoj kaj semajntagoj. Devizo de la kalendaro estas "La Eŭropa Unio estas kaj restas plurlingva. Necesas lerni fremdajn lingvojn!" Prezo: 10,50 gld.

Fianĉo de l'sorto, Johan Hammond Rosbach (1921-). Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 192p. 20cm. ISBN 87 85020 974. Romano en kiu kontrastigas la vivojn de du kuzoj, ambaŭ nomitaj Jonas Rodal, en Norvegio antaŭ kaj dum la dua mondmilito. Antaŭparolo de William Auld. Prezo: 17,40 gld.

Guerre des langues, La; Esperanto or English?, Henri Masson. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1976. 44p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 108A. Prezo: 1,80 gld.

Izolo (1939), K. Kalocsay (1861-1976). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1977 (faksimila represo). 80p. 17cm. Bindita. ISBN 92 9017 020 4. La tria originala poemaro de unu el la titanoj de la Esperanta literaturo, presita en 1939 kiel 77a eldonaĵo de Literatura Mondo, sed pro la militeksplodo ne aperinta publike. Antaŭparolo de W. Auld. Prezo: 16,50 gld.


Tito kaj la nealianciteco (1975), Ranko Petković. El la serbo-kroata. Sarajevo: Esperanto-Societo, 1977. 40p. Ilus. 20cm. Analizo de la ekstera politiko de la prezidento de Jugoslavio. Prezo: 3,90 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

La granda novaĵo nomiĝas: LA GRANDA KALDRONO

de JOHN FRANCIS, kiun oni post "Kvaropo" (1952) kaj "Vitrilo" (1960) emas konsideri ekscelenco precipe inter la prozistoj de la Esperanta literaturo.

Eldonis: TK/Stafeto, Antverpeno / La Laguna, 1978. 592p. 21cm. Belliteratura eldonserio, n-ro 37. ISBN 90 6336 001 0. La plej ampleksa originala romano en la Internacia Lingvo. PREZO: 42,00 (por Nederlando 43,68) gld., plus 10% sendokostoj. La Libroservo de UEA estas la ĉefa distribuanto de ĉi tiu eldonaĵo kaj donas do al la revendistoj la kutiman 33-procentan rabaton.





Kongresa Komunikilo

**63a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Varno (Bulgario)
1978 07 29 – 08 05**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Bul.
Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.**

Internacia lingvo – Internacia edukado. Jen la temo de la 63a UK. Ĝin parte inspiras la *Rekomendo pri edukado...* de Unesko, kiu aperis kune kun la decembra numero de la revuo *Esperanto*. Kongresanoj povos kontribui siajn ideojn al la Kongreso pri apartaj facetoj de tiu temo dum diskutrondoj: diversaj formoj de Esperanto-lernado (memlernado, studrondoj, korespondaj kursoj); kiel Esperanto povas kontribui al plenumo de la *Rekomendo*; la problemoj de komencantoj en la Esperanto-parolanta komunumo; lernado de Esperanto ĉe pliaĝuloj; kaj la eblecoj kleriĝi pere de Esperanto-lernado.

Novaj premioj por fotistoj. La fotografia branĉo de la Belartaj Konkursoj aljuĝos, aldone al la kutimaj mon-premioj, la jenajn objektojn tiucele donacitajn de la mondkonata entrepreno Agfa-Gevaert: unu kameraon Microflex 300, por 8-milimetraj filmoj; unu poŝformatan fotilon Agfamatic 4008; unu poŝformatan fotilon Agfamatic 2008; dek kvin 90-minutajn sonkasetojn; kaj dek altfidelajn sonbendojn, longajn po 360 m.

Artistoj sin anoncu. Kantistoj, aktoroj, deklamistoj kaj aliaj artistoj de la viva prezento skribu pri siaj talentoj al la membro de LKK respondeca pri artaj aranĝoj, s-ro Kiril Draĵev, per la adreso de LKK. Ekzistas ebleco ricevi honorarion kaj eventuale apartan subvencion por helpi la pagon de restadkostoj.

Unua Bulteno denove ricevebla. La Unua Bulteno de la 63a UK, kiu elĉerpiĝis frue post la eldono, represiĝis kaj estas denove havebla kaj ĉe la konstanta adreso de la UK (Roterdamo) kaj ĉe la LKK (Sofio). La Dua Bulteno aperos en marto.

Karavanu tra Brazilo. De la 17a ĝis la 22a de julio okazos la Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto en Marilia, Brazilo. Jam oficiale aliĝis al tiu kongreso la landaj movadoj de Argentino, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Ekvadoro, Kolombio, Peruo, Urugvajo kaj Venezuelo. De Nord-Ameriko kaj Eŭropo estos karavanoj al la Latinamerika Kongreso kiuj poste iros al Varno por la 63a UK. Tiuj, kiujn interesas la ebleco antaŭfrandi la landon de la 66a UK (Brazilo, 1981), skribu por detaloj al Flying Dutchmen Travel, Esperanto-Fako, 951 Front St., Novato CA 94947, Usono. De la sama

adreso oni povas akiri informojn pri karavanoj el Usono rekte al Varno.

Japana, belga kaj svisa karavanoj. Japana Esperanto-Instituto organizas 20-tagan karavanon kiu iros de Tokio tra Dubrovnik, Beogrado kaj Sofio ĝis la UK, kaj reiros postkongrese al Tokio tra Budapeŝto, Prago kaj Frankfurto. Informojn oni petu ĉe JEI, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio, 113 Japanio.

Belga Esperanto-Federacio organizas karavanojn per aviadilo, aŭtomobilo kaj aŭtobuso. Unu flugkaravano el Bruselo (1978 07 22-08 05) inkluzivas aŭtobusan ekskurson de Sofio ĝis Varno (tra Rila, Plovdiv, Kalofier, Tarnovo, Preslov kaj Pliska), kun reflugo al Sofio kaj de tie al Bruselo post la UK. Alia karavano (1978 07 29-08 12) inversigas la vojaĝmetodojn, kun flugo de Sofio ĝis Varno kaj aŭtobusa ekskurso reen. Por detaloj sendu internacian respondkuponon (aŭ belgajn pm. je valoro de 20 belgaj frankoj) al: Esperanto al Varna 1978, 23 av. Jos. Wauters, B-4400 Herstal, Belgio.

Karavano el Zuriko, Svislando, inkluzivos loĝadon apudstrandan en Oraj Sabloj (Zlatni Pjasaci), kaj kvar-tagan postkongresan turisman veturadon tra Bulgario. Detalojn oni ricevas de s-ro Otto Walder, Esperantoweg, CH-8590 Romanshorn, Svislando.

Favoraj kondiĉoj por aŭtomobilistoj. Eksterlandaj aŭtomobilistoj en Bulgario ne bezonas doganajn dokumentojn por siaj aŭtoj, kaj sufiĉas la ŝofora rajtigilo de la koncerna lando. La blua kaj verda asekurkartoj validas en Bulgario. Oni ricevas senpagan helpon ĉe malgrandaj paneoj, kaj, okaze de akcidento, oni ricevas senpagan kurachelpon ĝis forigo de vivdangero. Eblas lui aŭton, eventuale kun profesia ŝoforo, pere de Balkanturist. Oni povas informiĝi ĉe Balkanturist (Lenin 1, Sofia) ankaŭ pri benzinrabatoj ĝis 40% por vizitantoj.

Ĉu vizo necesas? Civitanoj de jenaj landoj ne bezonas vizon por Bulgario: Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Germana DR, Hinda Unio, Hungario, Islando, Jugoslavio, Mongolio, Norvegio, Pollando, Portugalio, Rumanio, San-Marino, Soveta Unio, Svedio kaj Tunizio. Aliaj sin turnu al bulgara konsulejo aŭ ambasado.

Jam pli ol mil. Jam (ĝis 1978 01 15) registriĝis 1151 kongresanoj, el kiuj la plej multaj ŝparis, aliĝante dum la unua periodo. Se vi volas ŝpari, ne atendu! La kongreskotizoj de la dua periodo validas ĝis la fino de marto.

**BELAJ KONGRESAJ GLUMARKOJ TRE
RAPIDE ELĈERPIĜAS. TIO OKAZOS
ANKAŬ KUN TIU DE LA 63a UK, ĈAR
ĜI ESTAS BELA (v. anoncon dorskovrile).**

Soveta Unio

- Kvankam Radio Moskvo apartenas al la unuaj uzintoj de la Internacia Lingvo en radiofonio (1923), ĝi ne aŭdiĝis en Esperanto dum pluraj jardekoj. Des pli surprize efikis al ni la sciigo, ke la 4an kaj 5an de februaro 1978 Radio Moskvo "eksperimente" elsendos en Esperanto, en la kadro de siaj itallingvaj programoj, inter la 18.30 kaj 19.30 laŭ la mez-eŭropa tempo. Esperanto estos en la programo ĉ. la 19a horo, kurtonde je 41m kaj 49m (6.14, 7.32 kaj 7.33mhc), kaj mezonde je 194m (6.14, 7.20, 7.32 kaj 7.33 megahercoj). Daŭrigo de la elsendoj dependas de la reeĥo. Oni skribu al: Radio Moskvo, Itala Fakto (s-ro V. K. Ŝvecov), Pjytnickaja 25, SU-113 035 Moskvo, Soveta Unio.

Norvegio

- En Sauda, la loka Esperanto-klubo denove ricevis komunuman subvencion de 1100 nor. kronoj, kio verŝajne estas la plej granda financa subteno al E-klubo ĝis nun en Norvegio. La urba biblioteko en Sauda ĉiujare kompletigas sian E-fakon per 20 ĝis 30 novaj titoloj. El la sama urbo oni raportas, ke en 1977 en Norvegio aperis entute 313 novaĵoj kaj artikoloj pri Esperanto en la nacilingva gazetaro.

Hinda Unio

- S-ino Saranath (103, Borewell Road, Whitefield 562 136, Bangalore Distr.), unu el la plej aktivaj esperantistoj en Hinda Unio, fine de la pasinta jaro vizitis Japanion, kie ŝi i.a. informiĝis pri la japana Esperanto-movado.

Irano

- Komenciĝis regula radioprogramo sub la titolo "Tra la mondo per Esperanto", en kiu la raportisto (mem kursano de d-ro Saheb-Zamani) intervjuas iun el la virinoj, kiuj korespondas per Esperanto, ĉiufoje pri alia lando.
- Sub gvido de prof. Momtaz ĉe la Universitato Farabi en Teherano, oficistino de la Irana Nacia Komisiono por Unesko, f-ino Musavi, preparas magistriĝan disertacion pri Esperanto sub la titolo "La rolo de


la lingvo en la internacia interkompreniĝo".

Portugalio

- La nacia portugala radio elsendis la 23an de decembro 1977 longan intervjuon pri la Internacia Lingvo kaj d-ro Zamenhof. Intervjuiĝis d-ro Albertino Matias, prezidanto, s-ro A. Simoes, vicprezidanto, kaj s-ino O. Almeida, sekretario de Portugala Esperanto-Asocio.

Hungario

- Okaze de la dua datreveno de la morto de Kolomano Kalocsay, Hungara Esperanto-Asocio lokis granitan



memor-tabulon (v. la foton) sur la kripton kun la cindro de la genia Esperanta poeto, tradukisto kaj lingvisto.

Japanio

- En multaj landoj okazas Esperantaj kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj, seminarioj ktp., sed nur en Japanio oni aranĝas "kunloĝadojn" de la movadanoj. Unu el tiaj tiklanomaj aranĝoj, la 11a Tutlanda Kun-

loĝado de Esperanto, okazos inter la 3a kaj la 6a de majo 1978 en la urbo Yaizu, centre de la lando. Temos fakte pri diversgradaj E-kursoj, ĉefe por la junularo. Eksterlandaj vizitantoj estas aparte bonvenaj (KKK, Esperanto-Domo, Tōkyō-to, Sibuyaku, Yoyogi-san-tyōme, 46-17, Sone-Build. 502, 151 Japanio).

Britio

- Du naciskalaj radio-elsendoj kaj du programoj en la loka radio inaŭguris la jubilean jaron de la Londona Esperanto-Klubo. La 75an datrevenon oni celebris la 13an de januaro i.a. per prelegoj pri la kluba historio kaj kantado de la kluba ĥoro. Parto de la kluba programo, kiu anoncis pri la jubileo, estis represita en la londona ĵurnalo *Evening Standard*.

Aŭstrio

- Jam dum pluraj jaroj en Vieno okazas tre sukcesaj Zamenhof-festoj, kunlabore inter Aŭstria Esperantista Federacio kaj diversaj nemovadaj kulturaj instancoj. La lasta el tiaj aranĝoj okazis la 17an de decembro, helpe de Societo por Internaciaj Kontaktoj kaj Aŭstria-Bulgara Societo. La ĉi-jara kongreslando Bulgario ĉefrolis en la programo.

FR Germanio

- Aŭgsburgo, kiu pasintjare gastigis SAT-kongreson, inter la 12a kaj 16a de majo 1978 estos la loko de la 56a Germana Esperanto-Kongreso. Paralele okazos ankaŭ aparta junulara aranĝo samloke. La programo de la Kongreso antaŭvidas i.a. inaŭguron de Zamenhof-strato.

Eldonaĵoj

- En Irano pretiĝas pluraj novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto: ampleksa vortaro Esperanto-persa (dek mil kapvortoj), nova eldono de *Esperanto-persa vortareto*, perslingva libro pri la Esperanta literaturo, 550-paĝa kolekto de artikoloj pri Esperanto (parte jam aperintaj en la persa gazetaro) kaj dua, kompletigita eldono de *Poemoj de Omar Kajjam*, en la traduko de G. Waringhien. Krome, deko da simpatiantoj de Esperanto en Irano jam donacis pli ol 5 000 guldenojn por subteni la eldonon de esperantlingva *Islama enciklopedio*.

Laŭ la projekto, temos pri 500–600-paĝa volumo kun artikoloj kulturaj kaj historiaj, sed ne religiaj.

Interlingvistiko

- La Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de la Universitato ELTE en Budapeŝto aranĝos, inter la 24a kaj 28a de julio 1978, la Unuan Interlingvistikan Kongreson. Al la Kongreso oni invitas ĉiujn interlingvistojn kaj esperantologojn, kiuj laboras en la diversaj universitatoj kaj sciencaj institutoj tra la mondo. Temoj de la Kongreso: Ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, socilingvistiko

kaj lingvopolitiko, lingvo-planado kaj lingvo-modeligo, interlingvistiko, esperantologio. Celo: kunordigo de la esploroj kaj kreo de konvena instanco por la integriĝo de la interlingvistiko kaj esperantologio en la lingvoscienco. Adreso: Universitato ELTE, Esperanto-fako, Pesti B.1-3, H-1364 Budapest V.

Volontula Servo

- Ekde sia estiĝo antaŭ tri jaroj, la Volontula Servo de UEA unuflanke ŝparis al la Asocio plurajn dekmilojn da guldenoj, kaj aliflanke alportis



valoran movadan kaj oficejan sperton al deko da ĉefe junaj homoj el 7 landoj de 4 kontinentoj. Meze de januaro reiris al Japanio s-ino Sonoko Kuzume (sur la foto), kiu dum la lastaj tri jaroj laboris ĉiusemajne unu tagon, senpage, en la CO de UEA. S-ino Kuzume fariĝis tre kompetenta kompostistino kaj ŝi intencas proponi siajn novajn kapablojn ankaŭ al la japana Esperanto-movado.

Muzikistoj

- Muzika Esperanto-Ligo (MEL), kunlaboranta faka asocio de UEA, havas nuntempe 67 membrojn en 16 landoj. Ĝi eldonas modestan sed interesan bultenon, *Muziko*, kiu estas sendata al ĉiuj membroj. Membroj de MEL povas fariĝi ne nur profesiaj kaj amatoraj muzikistoj, sed ankaŭ muzikŝatantoj ĝenerale. La adreso de la sekretario de MEL estas: S-ro David G. Hill, 18 Hawkenbury, Harlow, Essex, CM19 4HY Britio.

Fervojistoj

- Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), aliĝinta faka asocio de UEA, post kelkaj jaroj festos sian 75-jaran jubileon. Nun oni entreprenas paŝojn por verki "Historion de IFEFF" kaj petas ĉiujn posedantojn de malnovaj fervojistaj dokumentoj, revuoj, fotoj ktp. kontakti s-ron Joachim Giessner, Bahnhof, D-342 Herzberg am Harz, FR Germanio.

Unesko

- En la 16a konferenco de la internaciaj neregistraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko, fine de novembro 1977 en Parizo, UEA prezentis apartan rezolucion pri la rajto je komunikado. La rezolucio pledas por organizo de simpozio, kiu traktus diversajn aspektojn de la rajto je komunikado, inkluzive la paŝojn, kiujn necesus entrepreni por evoluigi la rimedojn de reciproka fluo de informoj kaj superi la obstaklojn al komunikado, precipe kulturan kaj lingvan diversecojn. La rezolucio estis akceptita per 58 voĉoj por, neniuj kontraŭ kaj 3 sindetenoj.

Socilingvistiko

- Inter la 14a kaj 19a de aŭgusto ĉi-jare, en Uppsala, Svedio, okazos la 9a Monda Kongreso de Sociologio. En ĝia 10-era socilingvistika programo troviĝas ankaŭ la temo "Lingvo kaj internaciaj rilatoj", kiu certe traktos ankaŭ Esperanton. D-ro Jonathan Pool (Dept. of Political Science, DC-30, University of Washington, Seattle, Washington 98195, Usono), organizanto de la programo pri socilingvistiko, anoncas, ke estas je dispono subvencioj por la vojaĝkostoj de personoj el la tuta mondo,

kiuj rolos en la socilingvistika programo de la Kongreso en Uppsala.

Interpretado

- La nacilingva gazetaro tra la tuta mondo en la lasta tago de 1977 dediĉis amason da atento al la malfacilaĵoj, kiujn la usona prezidento spertis kun sia interpretisto, okaze de la vizito al Varsovio. La interpretisto, Steven Seymour el Nov-Jorko, tradukis "dezirojn" kiel "amoravidon", "fondita" kiel "teksita", "forvojaĝis" kiel "abdikis" ktp. Oni, kompreneble, tuj trovis "pli polan" interpretiston por la prezidento, sed la varsovia paneo bele demonstris unu el la aspektoj de la lingva problemo, kiu jen kapablas kirli la aferojn eĉ je la plej alta nivelo.

Distingoj

- Tri konataj esperantistoj lastatempe ricevis altajn nemovadajn distingojn: En Londono oni honoris la komponiston Frank Merrick per "Ordeno de la Brita Imperio"; s-ro I.T. Maddern, vicprezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio, ricevis "Aŭstralian Medalon por Merito"; s-ro D. Adnadj, redaktoro de la jugoslavia periodaĵo *Voĉo*, ricevis rekonon pro elstara aktiveco por Esperanto.

Persone

Peevski

- Prof. Vasil Peevski, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, publikigis ampleksan studon "La scienco kaj la internacia lingvo" en la numero 2/1977 de la revuo *Scienca mondo*. La studo aperis ne nur en la Esperanta sed ankaŭ en la angla, germana kaj rusa eldonoj de la revuo.

Solzbacher


- D-ro William Solzbacher, akademiano, kiu dum multaj jaroj estis funkciulo de la usona radio-instanco "Voĉo de Ameriko" kaj ĉefrolis en ties Esperantaj elsendoj, antaŭ ne longe pensiigis. Tiukaza festo en Vaŝingtono komenciĝis per esperantlingva saluto al d-ro Solzbacher, kiu en sia respondo parolis pri Esperanto antaŭ multaj funkciuloj de la usona registaro. Longan intervjuon pri la Internacia Lingvo, kun d-ro Solzbacher, elsendis la ruslingva programo de "Voĉo de Ameriko".

Ĝivoje

- Marinko Ĝivoje (Poŝtfako 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio) verkas studon pri Jacobus Banisius (1466-1552), elstara humanisto kaj diplomato, kiu servis i.a. ĉe la romĝermana imperiestro Maksimiliano la Unua, ĉe Karlo la Kvina kaj ĉe la papo Leono la Deko. La verkan-to bonvenigus atentigojn pri arkivaj dokumentoj koncernantaj Banisius (Bannicius, Bannisis). La studo aperos nacilingve, kun Esperanta resumo.

Goodheir

- D-ro Albert Goodheir, verkisto kaj eldonisto el Skotlando, dum la jarŝanĝaj tagoj, kun grupo de kvin britaj instruistoj vizitis Chiavari (Italio) kaj prelegis en Esperanto. Grupo de italaj instruistoj vizitos Brition meze de ĉi tiu jaro. D-ro Goodheir prelegvojaĝos fine de februaro kaj komence de marto en Francio, laŭ invito de UFE.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1977, p. 66. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840kHz). I.P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290kHz), 31.33m (9575kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
18.00-18.15/Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz),

31.46m (9535 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 49.34m (6080 kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535kHz), 30.98m (9685kHz), 25.60m (11720kHz), 25.32m (11850kHz). Ripeto de la lunda programo.

Merkrede

18.00-18.15 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

17.50-17.55 Vieno, 203m (1475kHz). I.
21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

Vendredo

18.00-18.15 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.
20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.
22.00-22.15 Valencio. 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj" dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 05.30 ĝis la 06.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 16.30 ĝis la 17.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49m, 41m.

ĜENERALA AŬDEBLECO

- a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.
b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno, Zagrebo, Ibra Radio.
c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Berno (25.32m en Sud-Ameriko).
ĉ) Stacioj aŭdeblaj en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (30.98m, 25.60m, 25.32m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

Memoru, ke la plej efika subteno al la Esperantaj radio-programoj estas regula skribado al la koncernaj redakcioj!

NOVA ĈEFDELEGITO POR AŬSTRIO

Estas nomita nova Ĉefdelegito de UEA por Aŭstrio. Li estas S-ro Ernst Majtanić, Kalksburgerstrasse 40, A-1238 Wien 23; tel. 88 46 085. La ĝisnuna Ĉefdelegito, s-ro F.W. Rentmeister, post 13 jaroj en tiu ofico fariĝis 80-jara la 26an de januaro 1978. Dankante lin pro la longa kaj sindona laboro, ni deziras al li la merititan, emeritan ripozon.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRAZ: Carlos Lima Melo. FRANC: M. Chefd'homme, F. Lo Jacomo.

FR GERM: Eva Bork, W. Loose. HISP: Enrique Solá Palerm. JAP: Kazuko Kikušima, Yuki Yoshi Muramatsu, Yuiti Sawaya. NED: G. Abbas-de Hoop, M. Abbas, J. Hoekstra, J.H. Hoekstra-Sieders, Hans Muller, S.A.K. van de Zee.

KLARIGO KAJ DANKO

Pro la kutima jarfina laboramaso kaj iom ankaŭ pro riparlaboroj en la Domo de UEA, malsaniĝoj ktp. vi ne trovas ĉi tie la listojn de donacoj kaj membroj de Societo Zamenhof. Ili baldaŭ sekvos! La donacintoj kaj la SZ-anoj akceptu anticipan dankon!

igitajn de M. Sárosi, amiko de la poeto.

Ĉ. *Aŭtuna elegio* de Nikolai Kurzens (1910-1958). Li estis ŝtatoficisto en Latvujo. Liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj aperis unue en *Ondo de Daŭgava*, kiun li redaktis (1932-1934) kaj ankaŭ en *Literatura mondo* kaj *Norda literaturo*. Libroforme liaj poemoj estis publikigitaj en la antologio *Dekdu poetoj* (1934) kaj en aparta volumo *Mia spektro* (1938).

D. *Homo en la pluvo* de Edwin de Kock (1930-). Li estis instruisto pri la angla kaj afrikansa lingvoj en Sud-Afriko kaj verkis poemojn en tiuj lingvoj antaŭ ol li esperantistiĝis en 1955. Liaj poemoj aperis la unuan fojon en *Esperanta antologio*, poste en pluraj beletraj revuoj kaj ankaŭ en apartaj volumoj. *Fajro sur mia lango* (1967) enhavas la poemon parte cititan en tiu ĉi demando.

DEMANDO 17

(la respondo aperos en nia marta numero)

Ne nur homoj, sed ankaŭ urboj rolas en la historio de Esperanto. Tiu ĉi demando temas pri grandurbo, kiu estis la scenejo de gravaj eventoj en Esperantujo. Ĉi-sube 10 okazaĵoj estas koncize skizitaj. Kiom da informoj vi bezonas, antaŭ ol vi sukcesas diveni la nomon de la urbo?

a. En tiu ĉi urbo mondfama teatraĵo estis publikigita libroforme la unuan fojon antaŭ pli ol tri jarcentoj. La

unua traduko en Esperanton aperis antaŭ 84 jaroj kaj la dua versio en la Internacia Lingvo sekvis ĝin post 70 jaroj.

b. Legantoj de la *Jarlibro* de UEA trovas anoncon pri la urba Esperanto klubo, kiu fondiĝis antaŭ 75 jaroj. Okaze de la unua datreveno de la fondo, d-ro L.L. Zamenhof sendis saluton, ne per letero, sed per fonografo.

c. Antaŭ 73 jaroj Herbert F. Höveler starigis en tiu ĉi urbo la entreprenon Internacia Propagandejo Esperantista por eldoni la famajn propagandajn ŝlosilojn en diversaj lingvoj.

ĉ. Okaze de vizito en la urbo antaŭ 71 jaroj, ges-roj Zamenhof estis gastoj en la hejmo de Felix S. Moscheles, portret-pentristo, baptifilo de Felix Mendelssohn kaj altranga funkciulo en la urba kaj landa Esperanto-organizaĵoj.

d. Dum sia restado en la urbo, d-ro Zamenhof faris prelegon en historia konstruaĵo. Ĉe la fino de sia parolado li diris: "Longe daŭros ankoraŭ maluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate,..."



e. En aŭtuno de la sama jaro, kiam d-ro Zamenhof estis en tiu ĉi urbo, dek-okjara sviso, Edmond Privat, alvenis labori ĉe la eldonejo de progre-

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 16

(pri la demando v. nian januaran numeron, p. 19)

A. *Pluvo* de d-ro L.L. Zamenhof (1859-1917). Tiu ĉi poemo estas la lasta konata poemo de la kreinto de Esperanto kaj diferencas disde ĉiuj pli fruaj poemoj de la propagandaj jaroj. Laŭ la takso de Marjorie Boulton, *Pluvo* estas "la plej poezie aŭtentika, la plej teknike matura, inter la naŭ poemoj de Zamenhof".

B. *Pluvaj ferioj ĉe l'mara bordo* de Raymond Schwartz (1894-1973). Ĝi troviĝas en la poemkolekto *Verd-kata Testamento* (1926, dua eldono 1930, tria eldono 1974), kiu enhavas sepdekon da humuraj versaĵoj, kiujn Schwartz verkis kiam li gvidis la kabaradon Verda Kato en Parizo.

C. *Ran-kvarteto* de Julio Baghy (1891-1967), kiun la aŭtoro dediĉis "al la plendantaj nenifarantoj", venas de lia dua volumo de poezio, *Pilgrimo* (1926). La kolekto enhavas ankaŭ poemojn premiitajn ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj kaj aliajn muzik-

sema ĵurnalisto, kiu forte apogis la Esperanto-movadon.

f. Dimanĉaj diservoj en Esperanto por kristanaj esperantistoj en la urbo komenciĝis antaŭ 66 jaroj. Dum la pasintaj 27 jaroj tiuj diservoj okazas en la Franca Protestanta Preĝejo.

g. La Sankta Biblio en Esperanto estis eldonita en tiu ĉi urbo. La Nova Testamento aperis antaŭ 66 jaroj.

14 jarojn poste okazis la publikigo de la Malnova Testamento.

ĝ. Pro financa krizo en UEA antaŭ 42 jaroj, oni decidis transloki la Centran Oficejon de Ĝenevo al tiu ĉi urbo, kie la mastrumaj elspezoj estis je 50% malpli.

h. Du Universalaj Kongresoj okazis en la urbo, la unua en la 1930-aj jaroj kaj la alia 33 jarojn poste.

redaktis kaj multjare estis delegito kaj fakdelegito de UEA.

IVAN JAKOVLEVIĈ BRIL

En Ĥarkov (Soveta Unio), la 20an de oktobro mortis Ivan Jakovleviĉ Bril (1904-1977), aktiva en la Movado ekde 1923, ĉefe kiel instruisto kaj grup-gvidanto. Li i.a. gvidis E-klubon ĉe la loka domo de sciencistoj kaj estis UEA-delegito. Pluraj liaj tradukoj aperis tra la E-gazetaro.

HANS LÜTHI

La 8an de junio pasintjare, en Lenzburg (Svislando) mortis Hans Lüthi (1915-1977), iam UEA-delegito en Aarau, membro de UEA ekde 1938.

ANGEL RAMÍREZ TERUEL

En Alicante (Hispanio), la 29an de oktobro mortis Angel Ramírez Teruel (1895-1977), aktivulo en la vegetarana kaj naturista E-organizaĵoj.

Nekrologoj

LEHMAN WENDELL

En Minneapolis (Usono), en majo pasintjare mortis d-ro Lehman Wendell (1878-1977), dentisto, esperantisto ekde 1907. Li estis honora membro de ELNA, vicprezidanto de EANA dufoje; li gvidis lokajn grupojn, instruis Esperanton en la Universitato de Minnesota (1925), verkis multajn artikolojn pri Esperanto (ankaŭ dum la lastaj jaroj) kaj tradukis (*Sub la meznokta suno*, *Sep ridoj* kaj *La lasta usonano*). Membro de UEA dum pluraj jardekoj.

JOSE ANTUNES

La 1-an de januaro forpasis unu el la plej malnovaj portugalaj esperantistoj, Jose Antunes (1901-1978), kiu inter la jaroj 1952 kaj 1971 estis ĉefdelegito de UEA en Portugalio.

JAN POPLAWSKI

Post 30-jara servo kiel UEA-delegito, en Poznań (Pollando), la 9an de oktobro forpasis Jan Poplawski (1903-1977), unu el la plej fervoraj aktivuloj en la loka Movado.

MIKLÓS GÁDAROS

En Pécs (Hungario), la 20an de septembro forpasis d-ro Miklós Gádaros, kiu multe aktivis en la hungara E-movado, precipe sur la turisma kampo, kie li iniciatis i.a. la konatan aranĝon IREN.

ARPAD SIMON

La 1-an de aŭgusto 1977 en Bukareŝto forpasis Arpad Simon (1897-1977), kiu esperantistiĝis en 1919 kaj estis unu el la plej bonaj rumanaĵ konantoj de la Internacia Lingvo.

PIETER KORTE

En Emmen (Nederlando), la 7an de novembro mortis Pieter Korte (1894-1977), la plej elstara pedagogo inter

la nederlandaj esperantistoj, honora prezidanto de la nederlanda ILEI-sekcio. Li aktivis ekde 1927, unue en TAGE, poste en ILEI. Li multe instruis laŭ Cseh-metodo, sed poste verkis propran rektmetodan lernolibron *Sub la verda standardo* (1947), kiu ankoraŭ nun apartenas al la plej popularaj internaciaj lerniloj. Korte ankaŭ tradukis, verkis artikolojn,

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

16-jara junulino ŝatus koresp. kun samaĝuloj: Gamilhe Massoumzadhe, Abusaid-allay 15 (Ablind Allay Massoumzadhe 95), Tehran, Irano.

Kasetojn kun edifaj paroladetoj kaj kantoj (antaŭe elsenditaj per IBRA radio) aĉetu ĉe Förlag Gröna Stjärnan, Landerigatan 7, S-416 70 Göteborg, Svedio. Prezo: Sv. Kr. 20,—.

Mi deziras leterkontakton kun afabla, senfamilia, germana sinjorino/rentulino ĝis 67 jaroj. Skribu Esperante aŭ germane al Karl Nitsch, Bolivarstr. 8, D-8000 München 19.

En la pitoreska bavara urbo **Bamberg** okazos **Internacia Pacsemajno** (8 - 13.05.78). Ni korege invitas folklorajn grupojn por prezenti la internacian valoron de Esperanto kiel elstara neŭtrala paca ligilo inter homoj kaj popoloj. Kontakto: Hans Ph. Gunkel, poŝtfako 1469; D-8600 Bamberg.

Ekde la 15a de januaro 1978 nia nova adreso estas: Fam. Beverloo H., Mr. Hamersstr. 35, Nieuwegein (Utr.) Nederlando.

Anoncetoj

Venezuelanoj deziras korespondi kun gejunuloj de la tuta mondo kaj interŝanĝi bildkartojn, revuojn, poŝtkartojn ktp. R. Sevilla kaj L. Marin, Apartado postal 4845, Maracay, Estado Aragua, Venezuelo.

Bildkartoj, poŝtmarkoj, Esperanto-revuoj, gramofondiskoj interesas min: S-ino/S-ro H. Bein, Block 147/2, 409 Halle-Neustadt, Germana DR.

Maurice Sujet, emerita kolegidirektoro, 77320 Jouy-sur-Morin, Francio (antaŭe en Coulommiers), malgaje sciigas forpason de sia kara patrino. Ĉiuj esperantistoj kiujn ŝi gastigis havu penson pri ŝi.

Estas vendebla kolekto de E-insignoj (270 diversaj specoj). Esperanto-Klubo, ODPM, CS-03601 Martin, Ĉeĥoslovakio.

LLIBRERIA ESPERANTO en Barcelono (Hispanujo) deziras kontaktojn kun eldonistoj kaj libroservoj. Skribu: Llibreria Esperanto, strato Carreras Candi 34-36, Barcelono-28, Hispanujo; tel. 240 14 28. Samtempe informas ke la 19an de decembro okazis la inaŭguro. Novjaran saluton aŭ ĉiuj niaj geamikoj kaj klientoj.

S. Aragay.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (4a sesio)
UNIVERSITATO DE LIEÛO (BELGIO)
06 — 27 de aŭgusto 1978

SUK78

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon ĉe:
SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ,
Boîte Postale 9,
B-4000 Liège X,
Belgio.

SEKCIO A: ASTRONOMIO

- 1-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): Stela magnetismo
 2-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): La strukturo kaj dinamiko de nia galaksio
 3-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): Modernaj observoteknikoj en la astronomio

SEKCIO P: PSIKOLOGIO

- 1-a semajno: C. Piron (Svislando): Strukturiĝo de la personeco
 2-a semajno: M. Landmark (Norvegio): Enkonduko en la socialan, emocian kaj intelektan evoluon
 3-a semajno: J. Lieberman (Usono): Seksedukado kaj psikoterapio: integriĝo je mensa sanigo

SEKCIO IL: INTERNACIA LITERATURO

- 1-a semajno: V. Benczik (Hungario): Verkado kaj legado de belestro en fremda lingvo
 2-a semajno: G. Silfer (Finnlando): Stilistiko kaj literatura kritiko
 3-a semajno: G. Silfer (Finnlando): Sciencfikcio: internacia ĝenro por internacia lingvo

Ĉiu semajna kurso ampleksas 12 lekciojn de po 45 minutoj, kiuj okazas de lundo ĝis vendredo, ĉefe matene. Sabato estas dediĉita al ekzamenoj, ekskursoj, ktp. Studvizitoj estas antaŭviditaj.

Aliĝo: La horaro estas tiel aranĝita, ke eblas aliĝi al sekcio IL kaj samtempe al sekcio A aŭ al sekcio P. Krome, ĉiu kalendara semajno estas en si mem kompleta unuo. Oni do havas kvin aliĝeblecojn (sekcio A, sekcio P, sekcio IL, sekcioj A kaj IL, sekcioj P kaj IL) dum unu, du aŭ tri semajnoj.

Kromprogramo: Ekskursoj, vizitoj, film-vesperoj, sportado, kulturaj aranĝoj, perfektiga Esperanto-kurso gvidata de J.P. Vilhelm (Francio), ktp.

Kotizoj: Programkostoj (unu sekcio dum unu semajno): 900,-bf; Restadkostoj (modifeblaj) (semajne): ĉ. 2 000,-bf; Perfektiga Esperanto-kurso (semajne): 400,-bf; Taga kotizo por vizitantoj (sen restado): 200,-bf.

Stipendioj: Estas disponeblaj kelkaj stipendioj. Interesuloj sin turnu al la SUK-adreso.

Faldfolioj: Krom faldfolio kun ĝeneralaj informoj pri la sesio kaj aliĝilo, disponeblas dua faldfolio en kiu ĉiu kurso estas detale priskribita. Petu la du faldfoliojn ĉe la SUK-adreso.

Venu al

Internacia Teatra Renkontiĝo
 (sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio)

en Pollando, inter la 27a de majo kaj 4a de junio 1978

Partoprenos teatraj trupoj el Bulgario, Francio, Pollando, Soveta Unio kaj verŝajne aliaj landoj.

Via aliĝo al la oficiala karavano de UEA kaj la pola vojaĝagentejo Juventur inkluzivas:

- kulturan programon en Mielno,
- la Teatron Renkontiĝon en Gdansko,
- pliajn spektaklojn en Bidgoŝo,
- aŭtobusan transporton ekde kaj ree al Berlino,
- ĉiujn restadkostojn, inkluzive de manĝoj.

Ĉion ĉi kontraŭ nuraj 450,00 guldenoj!

Ĉiuj karavananoj ricevos liberigon de la deviga monŝanĝo en Pollando. Nur kvardek lokoj haveblaj! Aliĝu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kun indiko "Teatra Renkontiĝo" sur la pagilo. Limdato por aliĝo: 20a de aprilo 1978.



Facila kaj utila helpo

Pro sia profesia okupiteco, multaj homoj, spite al siaj deziroj, ne sukcesas aktivi en la Movado. Ili tamen estas membroj kaj regule pagas siajn kotizojn al diversaj organiz-aĵoj. Nu, ankaŭ

tio estas grava helpo al la Movado. Vi eble ne havas tempon varbi novajn membrojn por UEA kaj TEJO, sed vi ja trovos tempon simple disdoni la du belajn informilojn! Mendu ilin ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.



Kunveno! spertaroj kaj kunvenoj planitaj. Antaŭ ĉio kunvenoj por junuloj, kunvenoj internaciaj. Jen kio okazas pri TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj pri tiuj landaj sekcioj. La foto montras unu el tiuj spontanaj kunvenoj, kiuj okazas kadre de kunvenoj planitaj. Temas pri la 31a IJK (Internacia Junulara Kongreso) de TEJO en Fredericia, Danlando en 1975.


Tiaj scenoj ofte ripetigas. Ĉiujare IJK ie en la mondo kunvenigas inter 250 kaj 400 junulojn el pli ol 25 landoj en unika etoso, kiun el niaj plej bonaj fotoj povas nur parte komuni. Demandu al regula IJK-ĉeestanto ĉu tio veras. Petu detalojn pri la venonta IJK kaj la aliaj renkontiĝoj kiujn organizas la landaj sekcioj de TEJO.

tejo

IZOLO —el izolo al la publiko

IZOLO havas unikan historion. Kiel tion rakontas William Auld en la antaŭparolo, la unua eldono de tiu volumo, kiun abortigis la milit-eksplodo en 1939, estis praktike kvinekzemplera! Ĉi tiu fotorepreso, farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj, havebligas unuafoje al la Esperanta publiko parton de la heredaĵo de ĝia plej granda poeto. Dum preskaŭ duonjarcento, la originala poezio de Kalocsay reprezentiĝis esence nur per *Streĉita kordo*. Nun, fine, *Izolo* prenas sian lokon apud ĝi.

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Nederlando 17,16) gld., plus sendokostoj 10% Rabato por samtempa mendo de minimume 3 ekz., ekspeditaj al la sama adreso, 33%. Mendo ĉe la Libroservo de UEA.



POR DEMOKRATIA LINGVA



Ĉu vi konscias pri la lingva imperiismo reganta en la plej multaj ŝtatoj? **ETNISMO** pledadas por lingva kaj kultura samrajteco de la vaskoj, bretonoj, frisoj, aromunoj, kimroj, tataroj kaj de la ceteraj nenombreblaj minoritatoj tra la mondo. Ĉu tio ĉi ne estas fundamentoro ankaŭ de la Esperanto-movado?

ETNISMO aperas 3 fojojn ĉiujare, 16-paĝa, fotoprese, ilustrita. Jarabono kostas 8,—gm. Abonu ĉe UEA aŭ la eldonanto: U.J. Moritz, Feldstr. 38, D-5190 Stolberg 8, FR Germanio. Poŝtgironto: 232612-306 Hannover.

HELSINGÖR 1978

La Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj, la 46aj sinsekve, okazos de la 23a ĝis la 29a de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingör, Danlando. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Kaptu la okazon komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe:

S-ino Eva Langkilde
Ingemannsvej 18,
DK-3000 Helsingör, Danlando.

Pensu pri beleco

uzante sur viaj korespondadoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.

Mendu ĉe via landa libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Rotterdam.

